

Ankoro 17/12-98

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1998:5-6





**Organ för Svenska Esperantoförbundet**

ISSN 0014-0694  
Decembro 1998 • 86-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktion:**

Jan Setréus  
Franko Luin (teknisk redaktör)

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [espero@esperanto.se](mailto:espero@esperanto.se)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** HA Reklamtryck, Stockholm

**Prenumeration 1999:** 180 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

**ESPERANTOFÖRBUNDET**

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
[www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 1999:**

Direktansluten medlem 180 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 270 kr (inkl. 1 ex. av *La Espero*, tilläggsex. för familjemedlem kostar 90 kr)

**ESPERANTOFÖRLAGET**

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 - 34 08 00

**Fax:** 08 - 34 08 10

**Postgiro:** 578-5

**Hemsida:** [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

**Telefontid:** Samma som EsperantoCentro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Bertil Nilsson

**Manusstopp den 31/12****Manus till La Espero**

sänds till Jan Setréus  
Mörtgatan 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden  
(tel./fax 08 - 717 75 67)

*La Espero* estas presata  sur recikligita papero.

**Ni laboras korekte**

Mi gvidas laborgrupon por verki novan Esperanto-Svedan vortaron. En tiu laboro ni ofte fosas en la dika Plena Ilustrita Vortaro. PIV difinas la vortojn esperantlingve kaj donas multajn ekzemplofrazojn, por ke la leganto povu kompreni la kernan signifon de la aktuala vortradiko. La kerna signifo estas tre grava, ĉar la diversaj flekseblecoj rilatas strikte al la kerna signifo.

Se mi por la unua fojo renkontas la vorton intervju kaj ricevas la ĝustan tradukon de tiu vorto, mi mem povas tuj kompreni la formojn intervjuo intervjui intervjuata intervjuisto k.t.p.

Antaŭ nelonge mi aŭskultis prelegon de iu tre konata esperantisto. Tiu konatulo estis akademiano kaj devus scii kiel elekti ĝustajn vortojn por sin komprenigi. En sia prelego li uzis la vorton korekte kun la signifo ĝustamane, kaj mi pensis ke tio konfuzos novan esperantiston, kiu kredos ke korekte signifas ĝuste. Se la nova esperantisto nun volas traduki al si la signifojn de korekta kaj korekti, la rezulto estos ke li tradukos korekta en ĝusta/senerara, kaj korekti tiam devus havi la signifon kondukti ĝuste/senerare.

PIV montras tre klare:  
Korekt-i = forigi eraron, difekton.  
Korekt-o = erar-forigo.  
Korekt-a = erar-foriga.  
Korekt-e = erar-forigante.

PIV aldonas rimarkige, ke oni evitu la signifon ĝusta por korekta.

En la Etimologia Vortaro la verkin-to Ebbe Vilborg notas ke troviĝas ri-

markigo en PIV, kaj li aldonas ke la Akademio malrekomendis same. Tio ne malhelpis ke Ebbe Vilborg mem ne obeis laŭ Akademaj aktoj II 54, kiam mi aŭskultis prelegon de li antaŭ kelka tempo.

Korekta domo estas laŭ PIV "establejo, kie oni povas korekti kaj plibonigi junajn deliktulojn". Se vi iras ekster la normoj la lingvo perdos sian klarecon.

**Knabo, bubo, kaŭbo**

En nia laborgrupo por nova vortaro ni devas strikte pririgardi ĉiun vorton antaŭ enmeto en la vortaron. Ni ankaŭ daŭre legas novajn artikolojn en diversaj esperantogazetoj kie aperas opinioj pri novaj vortoj aŭ pri ŝanĝoproponoj. En la gazeto Brita Esperantisto s-ro Don Lord proponas ŝanĝon de la vorto kamerao. Li preferus la pli facile prononceblan kamero, kvankam tiu vorto jam troviĝas kun alia signifo. Mi mem ŝatus iri ankoraŭ unu paŝon kaj proponi la vorton kamro.


Alia vorto kiu dum jaroj zumis iritante en mia kapo estas la vorto kaŭboj-o, kiu plurale fariĝas ridinda, kaŭbojoj. Estus tre facile sekvi la formon de knabo kna-boj, bubo bu-boj, kaŭbo kaŭ-boj kaj ankaŭ plejbo plej-boj.

La vorto eĥo ne bone kongruas kun la sono de la fenomeno. Mi vidis almenaŭ dufoje anstataŭigo per eko-eko-as. La vorto eko estas bonega ĉar ĝi similas al la fenomeno.

Roland Lindblom

**NI PREZENTAS****Fredrik**

Fredrik Olofsson. Jen la kasisisto de SEJU: 25-jara instruisto, kiu nuntempe devas studas, ĉi-foje la germanan lingvon. Mi ŝatas legi, legi, kaj iomete verki, sed male al la averaĝa juna esperantisto mi ne estas komputil- aŭ retulo. Post sufiĉe longa aktiva periodo, mi nun provas eviti ekston de kontraŭmovada alergia.





# "Sveda" estrarano de UEA

*Pro la elekto de Kalle Kniivilä el Lund al la estraro de UEA*  
La Espero prezentas aktualan

*Gratulon pro via elekto al la estraro de UEA!*

Dankon.  
*Por informi pri via fono kiel esperantisto, ĉu vi povus diri kiam kaj kiel vi ekinteresiĝis pri Esperanto?*

Mi eklernis Esperanton kiel gimnaziano, kiam aŭtune 1982 mi hazarde trovis en biblioteko freŝan eldonon de

la finna-esperanta-finna vortaro. Komence estis ia ludo, kaj mi iom surpriziĝis, kiam mi malkovris, ke fakte sufiĉe multaj homoj efektive uzas la lingvon.

*Jam via nomo indikas finnan originon. Ĉu via gepatra lingvo estas la finna?*

Mi estas centprocente finna, mi naskiĝis en orienta Finnlando kie miaj gepatroj plu loĝas, kaj la svedan lingvon mi lernis en la lernejo. Al Svedio min logis mia edzino Maria Sandelin, kiun mi renkontis ĉe komuna esperantista konato en Lund.

*Kie vi studis por via nuna profesio, kaj kie vi unue laboris?*

Mi studis en la Universitato de Lund diversajn fakojn, interalie historion, la rusan lingvon kaj sociologion. Kiel ĵurnalisto mi komencis mian karieron ĉe la finnlingva redakcio de la loka radiostacio Radio Malmöhus. Dum mia studtempo mi ankaŭ multe verkis por la maldekstra finna gazeto Kansan Uutiset, kaj en 1991-1992 mi laboris kiel ĝia korespondanto en Moskvo. Pli poste mi ankaŭ laboris kiel loka redaktoro de la sama gazeto en la urbo Vaasa (svede Vasa) en okcidenta Finnlando.

*Por kiu ĵurnalo vi nun laboras?*

Nun mi estas dungito de Sydsvenska Dagbladet, la plej granda gazeto en Malmö.

*Kiel vi informiĝis, ke oni elektis vin estrarano de UEA?*

Mi ne povis ĉeesti la kongreson en Montpeliero, sed klopodis sekvi la okazojn per Interreto. La nomaron de la nova estraro mi trovis en la reto ŝajne la tagon post la elekto.

*Ĉu via kapablo plenumi la taskojn de la laborkampo informado en UEA estis antaŭkondiĉo por la nomumo, aŭ nur kroma avantaĝo?*

Mi supozas, ke la elektokomisiono decidis proponi min por la tasko grandparte pro tio, ke ĝi volis havi profesian ĵurnaliston, kaj kontentis pri mia laboro kiel redaktoro de la gazeto "TEJO tutmonde" dum la jaroj 1993-1997.

*Kiuj estas viaj ĉefaj celoj sur via posteno en UEA?*

Kiam oni parolas pri UEA kaj informado, oni devas memori, ke informado pri Esperanto ne estas unuavice la tasko de UEA - pri tio okupiĝu la landaj asocioj, tie kie ili ekzistas.

La ĉefa celo de UEA sur tiu kampo estas informi aliajn internaciajn

organizaĵojn pri la ekzisto kaj funkcio de UEA. Grave estas kompreneble ankaŭ provizi la membraron kaj aliajn esperantistojn per aktualaj informoj pri la asocio.

Mia unua celo tiurilate estas certigi, ke UEA pli vaste utiligu la rimedojn, kiujn proponas Interreto. Jam nun la Centra Oficejo regule uzas retroŝton por dissendi aktualajn gazetarajn komunikojn, sed necesas fortigi la ĉeeston de UEA en la Tut-Tera Teksajo.

*Ĉu eblos kombini vian laboron en Roterdamo kun familia vivo en Lund?*

Fakte la estraro de UEA ne laboras en Roterdamo, kaj ŝajnas, ke el la estraranoj ĝuste mi loĝas plej proksime al nia asocia ĉefurbo. La estraro kunsidas dufoje jare, unu fojon vintre en la Centra Oficejo, kaj unu fojon some-re, kadre de la Universala Kongreso. Cetere ni laboras letere, kaj ĉefe ret-letere. Sed estos tre grave persone ekoni la aliajn estraranojn dum la venonta kunsido.

Sed pri familia vivo... Mi kaj Maria ja havas du infanojn, Ville, kiu baldaŭ iĝos kvarjara, kaj Alva, kiu naskiĝis maje. La malgrandaj infanoj postulas tre multe da tempo, kaj sekve la tempo, kiun mi povas dediĉi al mia estrara laboro estas sufiĉe limigita. Tamen la tasko estas interesa, kaj mi esperas, ke mi sukcesos plenumi ĝin akcepteble bone.

*Ĉu Esperanto estas via hejma lingvo?*

Ekde 1985, kiam ni renkontiĝis, mi kaj Maria parolas nur esperante inter ni. Tamen al la infanoj Maria ja parolas svede, kaj mi finne, do nuntempe oni aŭdas tri lingvojn hejme ĉe ni.

*Dankon pro via komplezo intervjui!*

Ne dankinde.

Intervjuis:  
Jan Setréus

## Esperantolinjen 1999 - 2000

Under en termins studier i Esperanto – 22 timmar/vecka – kan du som nybörjare nå en nivå, där du inte bara kan läsa och skriva utan även tala språket. Efter 4 månaders studier kan du avlägga skolans internationella Esperantoexamen, som är propedeutisk för Internationell Examen.

Undervisningen är från första början helt på esperanto, initialt med bilder och enkla strukturer.

En dramatisk termin väntar dig med internationella kontakter. Med esperanto lär du dig inte bara ett planerat, neutralt språk utan du gör också en insats för förståelse över gränserna, rättvisa mellan alla språkkulturer, solidaritet och fred. Många kallar esperanto för brodersmålet!

### Kurstider

Terminskurs 30/8 1999 - 17/12 1999

Sommarkurs 14/6 1999 - 24/6 1999 (separat prospekt)

### Boende

Om du väljer att bo på skolan, får du bo i ett hus med 13 enkelrum. Varje rum har kylskåp, dusch och toalett. Gemensamt för alla i huset är pentry, klädvårdsrum och dagrum med TV.

### Kostnad per termin

Internatelev (mat må-fr inkl. kvällsmat må-to) - ca 12.820 kr (800 kr/v)

Externatelev med lunch - 3.530 kr (220 kr/v)

Externatelev utan lunch - 800 kr

Studielitteratur - ca 200 kr

### Studiestöd

Nordiska elever utanför Sverige kan söka stipendier från Nordens Folkliga Akademi, Box 120 24, 402 41 Göteborg.

Stipendier finns också att söka från Svenska Esperanto-Institutet, Sö Stommen 112, 438 32 Landvetter.

Vad gäller studiestöd från CSN, kontakta närmaste Arbetsförmedling.

### Vem frågar man

Ring gärna linjeföreståndare Lars Forsman om du vill veta mera, tel. 0586 - 646 00.

Gratulu  
interrete!

Naskiĝtago? Datreveno  
de ekzameno? Nomotago?  
Geedziga tago?

Gratulu per virtuala floreto!

<http://esperanto.nu/gratulas>



## Someraj kursoj en Lesjöfors

### NASKIĜIS HIRUNDO

La Esperanto-klubo en Upplands Väsby prezentis novan informfolion en formato de faldita A4, kiu portas la nomon La Hirundo. Por sukcese plenumi la ĵurnalistan ideon oni petas pri kontribuoj de kluboj kaj organizaĵoj. Oni intencas publikigi ĉ. 8 numerojn jare po 10 kronoj por numero. Poŝtĝiro 69 62 79 - 9, Esperanto i Väsby

(El La Hirundo nov. 1998)

### INFORME

Håkan Lundberg, vicprezidanto de SEJU havas novan telefonnumeron: 08 - 717 78 69

Meze de junio mi havis feliĉan eblecon partopreni internaciajn somerajn kursojn en malgranda urbeto de Svedio, Lesjöfors [ Leŝefoŝ ], kiu situas proksimume 300 kilometrojn de Stokholmo, en orienta parto de la provinco Vermlando. En Lesjöfors jam la duan jaron funkcias Esperantodomo, kiu apartenas al la svedaj esperantistoj. Ĝi funkcias kiel kursejo kaj konferencejo por esperantistoj kaj esperantoorganizaĵoj, kaj ankaŭ kiel gastigejo por turistoj. Esperantodomon posedas kooperativo, kies membro rajtas esti ĉiu esperantisto aŭ simpatianto de esperanto.

Jam la duan jaron en Esperantodomo okazas someraj kursoj. Antaŭe ili okazis en Popola Altlernejo de Karlskoga, kiu ĉiujare havas ankaŭ plensemestran 16-semajnan esperantokurson.

Ĉiujare somerajn kursojn partoprenis proksimume 50 kursanoj el tuta Svedio. Estis po kelkaj gastoj el Danio kaj Pollando, po unu el Latvio kaj Ukrainio. Funkciis 5 grupoj: infanĝrupo, komencantoj, progresintoj – daŭrigaj grupoj A kaj B, kaj konversacia grupo.

Konversacian grupon, kiun partoprenis ankaŭ mi, gvidis al multaj Latviuj esperantistoj bone konata Natalia Berce, kiu jam 6 jarojn loĝas en Svedio. Ĉiutage okazis 6 lecionoj. Dum ili ni multe parolis, ludis, rakontis pri ni mem, eksciante ankaŭ multe pri vivo kaj interesoj de samgrupoj. Samtempe estis ebleco lerni kiel instrui. Ni vizitis aliajn grupojn kaj rigardis laboron de instruistoj. Unutage mi anstataŭis instruistinon de konversacia grupo.

Ankaŭ vesperaj programoj estis abundaj. Okazis interkona vespero, koncerto de Nata Berce kaj Georgo Hanzlik, internacia vespero. Latvio estis prezentita per lulkanto de R. Pauls "Kristnaskofesto de Grileto" kaj per poemo de N. Kurzens "Virino".

Okazis ankaŭ kvizo pri historio de esperanto. La unuan lokon kaj kasedon de Nata Berce "Feliĉo" gajnis mi.

Estis organizitaj ankaŭ kelkaj ekskursoj. Ni vizitis muzeon kaj ĉirkaŭaĵon de Lesjöfors, ĝuis belegan naturon de Vermlando. Sed pleje min impresis vizito de la muzeo de fama sveda verkistino Selma Lagerlöf - bieno de Mårbacka [ Morbaka ], kie ŝi loĝis dum multaj jaroj.

Deĝ tagoj pasis rapide kaj venis tempo por adiaŭ. En la memoro restis riĉegaj impresoj, novaj amikoj kaj belegaj kantoj. Ankaŭ tiu ĉi kanto de

pola bardo Georgo Hanzlik:

La altaj arboj, meznokta suno,  
Plinombas alkoj tie ol la homoj,  
Meze de lagoj, rande de l'mondo:  
Jen nia domo, jen nia domo.

Tutan jaron mi atendas  
Por finfine en junio  
Forvojaĝi kun gitaro  
Al l'bieno en Nordio.

Tra fenestro okulumas  
Alko ema je la scio,  
Timo skuas mian gorĝon  
En bieno en Nordio.

Altan prezon de biero  
Jen mildigas tiu scio:  
Baldaŭ venos somermezo  
Kun biero en Nordio.

Margarita Zelve  
(El Latvia Esperantisto aŭg. 1998)

## Jarkunsido de Esperanto-Gården

Vendrede la 25-an de septembro, antaŭ la seminario de la Instituto, okazis la jarkunsido. Ĉi tie venas nur la informo, ke Märtha Andréasson fariĝis nova prezidanto post Bengt Nordlöf. Bengt retretis iomete kaj fariĝis anstataŭanto kune kun nova Åke Rohdin. La du aliaj estas Göran Östling kaj Lennart Svensson - reelektitaj. Tio signifas, ke troviĝas 4 anstataŭantoj ekde ĉi tiu jaro. Kune kun Märtha en la estraro troviĝas Kaisa Hansen, Britta Rehm, Carl-Erik Ohlsson kaj nova Kjell Randehed. Prezidanto de la kunsido estis Bertil Andreasson.

Roland Lindblom

## Jarkunsido de Sveda Esperanto-Instituto

Jarkunsido estas kunsido por reprezentantoj de la membroorganizaĵoj de la Instituto. Ĉiu organizo (SEF, SEJU, KELI, ILEI, SLEA) rajtas havi du reprezentantojn. Neniu reprezentis SEJun ĉi-foje.

La kvin personoj en la direkcio estis reelektitaj. Tio signifas ke Bo Sandelin daŭre gvidas la laboron. La aliaj direktoroj estas Märtha Andréasson, Bertil Andreasson, Lars Forsman kaj Inga Johansson.

En la jarraporto oni povas legi ke 7 personoj ricevis stipendiojn por siaj studoj en Karlskoga Popola Altlernejo.

En la ekonomia raporto oni vidas ke 20.000 kronoj iris al Esperanto-Gården. Tiu elspezo estas aprobita de la membroorganizaĵoj en la Instituto.

Prezidanto de la kunsido estis Roland Lindblom, sekretario Britta Rehm.

Roland Lindblom

## Nova kotiza sistemo por membroj de SEF

En sia lasta jarkunveno la membroj de SEF decidis, ke ek de 1999 nova kotiza sistemo funkcios en SEF. Ĝi ne multe diferencas de la malnova, escepte de unu grava punkto: enkonduko de kategorio "familio".

Bonvolu noti, ke la kotizoj menciitaj pli sube en la artikolo validas por tiuj, kiuj estas rektaj membroj de SEF. Tiuj, kiuj membras pere de siaj kluboj, sekvu la klubajn kotizojn.

### Tri kategorioj

La membroj povas aparteni al unu el tri kategorioj: ordinara membro, junulara membro, familio. Ordinara kaj junulara membro sekvas la ĝisnulinajn membrokategoriojn. Familio laŭ la novaj reguloj membras kolektive, t.e. ĉiuj *nomitaj* membroj de unu familio estas membroj, kontraŭ pago de unu kotizo, sendepende ĉu ili estas du aŭ dek. La postulo estas, ke la individuaj nomoj devas esti donitaj al SEF.

### Simplaj kotizoj

Ankaŭ la kotizaro estas simpligita. Ĝi baziĝas sur la ordinara kotizo (180 kr por 1999). Por ĝi la membro ricevas la membrogazeton *La Espero*. Junulara membro (ĝis inkl. 20-jara) pagas 50% de la ordinara kotizo (90 kr por 1999) kaj ricevas la membrogazeton *La Espero*. Familio pagas 50% pli ol ordinara membro (270 kr por 1999) kaj ricevas unu ekzempleron de la membrogazeto. Familio povas aboni al pliaj ekzempleroj de *La Espero* kontraŭ 50% de la ordinara abono, kiu egalas la membrototon (90 kr por 1999). Tiu abonkotizo validas por la membroj de la familio, ne por eksteroj.

### Pli da membroj

La celo estas havigi pli da membroj al SEF, eĉ se ili ne estos aktivaj, kaj precipe junajn membrojn, al kiuj SEJU povus turni sin invitante ilin al junularaj aranĝoj kun la espero, ke ili ekinteresiĝos pri esperanto. Sed ankaŭ edzoj aŭ edzinoj de membroj estas bonvenaj al SEF kiel membroj.



# Esperanto-Gården bra affär om vi kan leda den bra

*Det var rätt tillfredsställande siffror i Esperanto-Gårdens bokslut efter första hela verksamhetsåret. Framtiden är ljus för vår anläggning. Men den nya styrelsen bör se över arbetsformerna och kooperativets medlemmars aktivt hjälpa valberedningen att finna de bästa kandidaterna, anser den avgångne ordföranden Bengt Nordlöf.*

Esperanto-Gården har nyligen hållit stämma efter sitt första hela verksamhetsår.

Det mesta ser mycket bra ut. En del till och med bättre än förväntat. Vad förväntade man sig då?

Innan jag ett par år sedan engagerade mig i kooperativets bildande och köpet av vår fina fastighet sökte jag svaren på några frågor. Eftersom allt verkade positivt tvekade jag aldrig. Det var dock en fråga som jag aldrig tänkte på att ställa mig. Men vi börjar med dem jag ställde:

Behövs en egen anläggning? Lätt att besvara jakande. Och två års facit bekräftar detta. Två tvåveckors sommarkurser i esperanto på olika nivåer – även en barngrupp – har hållits. SEF har hållit en kongress på Esperanto-Gården och redan beslutat att återvända med nästa års. Svenska arbetesperantoförbundet har hållit årsmöte där. Esperantoinstitutet har hållit två seminarier. Och en kulturfestival har det varit. Och nästa varit på tal.

Vidare i de frågor som föregick etablerandet: Kan tillräckligt eget kapital skrapas ihop? Jag hoppades det. Facit är 354 000 kronor. Med andra ord – det gick bra.

Kan vi få tillräckliga intäkter på verksamheten? Så att kostnaderna täcks och det helst blir ett överskott som kan användas för esperantos tillväxt? En kalkyl, grundad snarare på förhoppningar än på hårda fakta, såg bra ut. Två poster har blivit överraskande stora, men de balanserar i stort varandra: dels gåvorna, dels kostnaderna för fastighetens iordningställande.

Redan innan vi fått alla tillstånd klara hade vi nått nästan hälften av de övernattningsplatser per år som kalkylen räknade med. Men övernattningsplatserna måste öka, något som inte oroar mig.

"Personella resurser" brukar det heta med en något byråkratisk term. Fanns dessa? Jag tvekade aldrig. Men Ros-Marie Refai, som hon då hette – nu Karlsson, har lämnat Esperanto-Gården. Kvar är Lennart Svensson, en absolut ovärderlig tillgång. Det är, som några har påpekat, en risk med att en enda bär upp så mycket. Även Lennart skulle kunna bli påkörd... På enstaka frågor till styrelsen har vi bara kunnat svara: Nej, vi har ingen beredskap för en sådan eventuell si-

tuation...

Ytterligare en fråga var den om frivilligt arbete från landets esperantister. Även där är det två saker som i varje fall jag inte kunde förutse. Arbetsinsatsen från de många är mindre än man kunnat önska. Men. Arbetsinsatsen från några få är däremot långt större än man ens kunnat drömma om.

Sammanfattningsvis kan man så långt säga att allt är gott och väl. Husset är i gott skick och både arrangemangen och turistövernattningsarna växer. Framtiden är ljus. Ändå finns det ett problem. Som jag ser det har ledningen för Esperanto-Gården inte varit tillräckligt bra, styrelsearbetet har inte helt hållit måttet. Jag törs till och med påstå att vissa saker vid gården blivit bra, inte tack vare en bra ledning utan snarare trots bristfälligt styrelsearbete.

En kedja är inte starkare än dess svagaste länk, heter det i ett vanligt talesätt. Frågan är om inte styrelsearbetet utgjort den svagaste länken hitintills.

Ett annat talesätt är det om att man "ska inte kacka i eget bo". Så sant. Men vore det inte än värre om nu en krissituation skulle uppstå och detta kom som en blixt från klar himmel för alla utom en liten grupp med bra insikt i Lesjöfors. När jag lämnade ordförandeskapet och styrelsen (jag kvarstår ännu som suppleant) ombads jag berätta för stämman varför jag avgick. Ett inlägg var förberett men jag avstod på stämman.

Den fråga som jag aldrig ställde mig inför grundandet var denna: går det att med våra förutsättningar i esperantoförbundet få till en bra styrelse som gör ett gott jobb?

Mycket har nu också gjorts i styrelsen och mycket har gjorts bra. Det är alls ingen krissituation. Men det är också mycket som inte gjorts och somligt som gjorts har inte blivit så bra som det borde.

Den så kallade personkemin har säkert spelat sin roll i styrelsearbetet. Men detta får inte hindra den nya styrelsen från att analysera arbetsformerna och kanske söka andra sådana. Vi har ju av tradition en föreningskultur som är bra när man leder klubbar och andra ideella organisationer. Kanske behöver den modifieras när man ska leda ett företag, som ju faktiskt kooperativet Esperanto-

Gården är.

Vad som dock slutligen avgjorde att jag offentliggör dessa funderingar är valberedningens bekymmer inför den nyligen hållna stämman. Det var naturligtvis fint att det fanns ett färdigt förslag att lägga fram för stämman. Men förslaget hade tarvat mycken möda enligt vad jag förstätt.

Den nya styrelsen ska ses om en övergångslösning. Medelåldern är hög och om det inte blir svårfyllda luckor om ett år så blir det i varje fall så om två, detta framkom när nya styrelsen konstituerade sig.

Det är alltså inte för att ställa till något offentligt gräl som jag publicerar dessa tankar. Det är för att medlemmar i kooperativet, enskilda så väl som klubbar, ska ha tid på sig att finna konstruktiva förslag för Esperanto-Gårdens framtid. Jag är fortfarande övertygad om att framtiden är ljus, om vi hanterar den på rätt sätt.

Bengt Nordlöf

## Letero de la franca ministrejo pri edukado al SEF

*Vous êtes producteur d'une ressource électronique qui est désormais répertoriée et décrite sur le site Educasource du Ministère de l'Education Nationale, de la Recherche et de la Technologie (<http://www.educasource.education.fr>) sous l'intitulé "Kiosken".*

Per retletero kun tiu komenco la franca ministrejo pri edukado informis al SEF, ke ĝi aldonis **Kioskon**, la interretan kolekton da ligiloj al gazetoj tra la tuta mondo (nun pli ol 6500) al sia kolekto de rimedoj utilaj al la francaj lernejoj.

Educasource estas speciala programo, kiu direktas sin al la francaj instruistoj por instigi ilin utiligi la riĉcon da informoj en la interreto por vastigi la horizonton de siaj lernantoj. En ĝi speciale utilaj rimedoj estas detale prezentitaj. La **Kiosko** de SEF estas unu el ili.

Franko Luin  
prizorganto de Kiosko



# Ruza profesoro, perfekta hungarino, spektinda gurdisto

*Estis ĝuo aŭskulti prelegojn, babili kun la aliaj partoprenantoj kaj manĝi tion kion kelkaj helpemaj partoprenantoj kuiris por nia bonfarto. Denove okazis interesa seminario aranĝita de la Esperanto-Instituto, kaj ĝi denove okazis en "nia propra" Esperanto-Gården. Tre bona tradicio.*

La dutaga aranĝo komenciĝis antaŭtagmeze sabate, sed la plej multaj el 65 aliĝintoj venis al Lesjöfors jam vendrede posttagmeze, ĉar tiam okazis la jarkunsido de la ekonomia societo Esperanto-Gården. (Legu aliloke pri ĝi).

Sabate, je la 10-a horo, la estro de la Instituto, Bo Sandelin, inaŭgure bonvenigis nin ĉiujn, kaj precipe tur-nis sin al la invititaj prelegantoj. Katalin Smideliusz el Hungario komencis per prelego pri Andreo Cseh. Katalin estas jam vaste konata en la esperantomovado kiel instruisto kaj pedagogo, speciale pri instruado por havigi novajn talentajn instruistojn al nia movado. Ŝi diris ke neniu estas tute perfekta en esperanto, sed ŝi troviĝas inter tiuj malmultaj, kiuj estas plej proksime al la punkto de perfekteco.

La prelego pri la "patro" de la Ĉe-metodo estis vere tre interesa, kaj ĝi montras ke esperanto estas disvastig-ebla kiam talento, spirito, celkonscio kaj dediĉemo kuniĝas en iu homo. Andreo Cseh fondis instituton en Nederlando 1930, kaj la ĉefa celo estis eduki Ĉe-metodajn instruistojn.

La dua preleganto, Vjaĉeslav Hromov, instruas studentojn en la angla, en latino kaj en esperanto. Profesoro Hromov loĝas en Estonio kun Helgi, edzino, kiu ankaŭ instruas esperanton.

La titolo de lia prelego estis "Kia solvo de la lingvoproblemo en unu-iginta Eŭropo?" Li inter alie rakontis ke li kiel instruisto, devas post kvin jaroj da instruado, ekzameniĝi en la angla, antaŭ juĝantaro, por montri ke lia kono de la lingvo estas sufiĉa. Ĉar oni mem povas elekti prelegte-mon je tia okazo, li faris prelegon pri esperanto. Li ne nur sukcesis montri ke lia lingva kapablo estis sufiĉa, li per sia prelego ankaŭ vekis intereson por esperanto ĉe kelkaj.

Trialoke venis Ebbe Vilborg, kaj lia temo estis "Zamenhof – ĉu kreanto aŭ imitanto? Pri la etimologio de la gramatikaj elementoj en esperanto". Li komparis la diversajn alternativojn kiujn Zamenhof enmetis kiel finaĵojn antaŭ 1887 kaj en la reformproponoj, kiuj aperis 1894. La personoj kiuj en 1894 partoprenis en la voĉdonado, plejparte ne akceptis la reformpropo-n, kaj tial restas la oficiala versio de 1887.

Vilborg havis problemon, same kiel aliaj esplorantoj, trovi komentojn

de Zamenhof pri lia elekto de grama-tikaj finaĵoj, ĉar Zamenhof neniam prezentis iun superrigardon pri siaj elektoj.

Bertil Andresasson ankaŭ aperis kiel preleganto, kaj li informis pri la ILEI-konferenco en Francio en aŭ-gusto.

Roland von Malmberg – politikisto kaj gurdisto – prezentis vastan gamon de distraĵoj por ni dum la vespe-ro. Tio okazis en la muzeo de Lesjö-fors.

Li kantis kaj kantigis la publikon. Li rakontis anekdotojn kaj kelkfoje ald-onis seriozajn komentojn pri vivomedi-aj kondiĉoj. Do, tre agrabla kaj amu-za vespero kun artisto kiu lernis espe-ranton antaŭ multaj jaroj kaj anko-raŭ memoras sufiĉe por uzi la lingvon antaŭ publiko, kvankam li nuntempe malofte uzas ĝin.

Dimanĉe Katalin Smideliusz deno-

ve aperis antaŭ ni, kaj ŝi rakontis pri hungara kulturo kaj precipe pri mu-ziko kaj komponistoj. Ŝi prezentis mu-zikpecojn pere de sonbendo.

Poste mi aŭdis komentojn de aŭskultintoj, kiuj diris ke tiu prelego estis la plej bona kaj interesa dum la seminario.

Vjaĉeslav Hromov revenis kun prelego pri la Esperantoinstituto en Estonio kaj li ankaŭ informis pri la ali-aj institutoj, kiuj troviĝas en aliaj lan-doj. Li estas la direktoro de la institu-to en Estonio kaj sekvas la agadon en aliaj institutoj.

La seminario finiĝis post la lunĉo kaj la plej multaj partoprenantoj eki-ris hejmen, sed kelkaj restis por par-topreni en la kurso "Historio kaj lite-raturo de Esperanto", kiu daŭris de lundo ĝis vendredo antaŭtagmeze.

Roland Lindblom

## Paul Gubbins pasportis en Usono

Brita profesoro kaj ĵurnalisto Paul Gubbins vizitis nin frue ĉi-somere lige al la videokurso Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo. La ĉirkaŭ 30 centi-gradoj en la kalifornia ĉefurbo pelis lin kaj la redaktoron de ĉi novaĵletero en bierejon . . .

I.Q. - Vi estas ĉi tie por la dua fojo por kaj pro la videokurso Esperanto, Pasporto al la Tuta Mondo . . .

Kelkaj nomas Pasporto aŭdaca projekto; laŭ aliaj ĝi estas epokfara. Kial, do, laŭ vi ĝi estas historia?

P.G. - Neniam antaŭe en Esperan-tio oni registris (ajnmaniere) dramon tiel imponan (pli ol kvinhoran), kiu ankaŭ haveblas por la publiko, kaj ne nur la Esperanta. Ĝi ja restos en la historio de Esperanto. Aliflanke, por mi persone estas granda sukceso, pro kiu mi ja rajtas fieri, vidi mian verkon realigitan de manpleno da dediĉitaj samlingvanoj . . .

I.Q. - Sed, sendube, aperos iuj, kiuj kritikos la projekton, ĉu pro la alta prezo, ĉu pro la foja "neakademia" akĉento, ĉu pro la nesufiĉa interna-cieco.

P.G. - Ĝenerale, tiuj kritikis el siaj dormoĉambroj, el siaj kabinetoj, kiu

ja estas for de la ĉiutaga Esperanto (lingvo kaj movado). Oni neniam povas kontentigi ĉiujn. Nia projekto evoluas sur du planoj: unu lingva kaj alia kultura. Ni volas ja instrui Esperan-ton, sed ankaŭ enkonduki la lernan-tojn en la Esperantan mondon, kiu ja ne estas perfekta. Ĉiutagaj uzantoj de Esperanto havas naciajn akĉentojn, ili faras erarojn, ili ne estas perfektaj, ide-alaj. Antaŭ ĉio, ili estas homoj. Ĉu estus preferinde fari nenion pro timo de kritikoj?

I.Q. - Ĉu vi estas kontenta pri la ĝisnunaj kvalito kaj sukceso de la fa-rita laboro?

P.G. - Ni devas konscii, ke nenio estas perfekta (eĉ ne la ĉi-tiea biero, ce-tere tre bona). Kio ĉagrenas min estas la fakto, ke tro granda parto de la Es-perantaj periodaĵoj tute ignoras nian projekton. Estas nekredible, ke tia im-pona projekto "ĝuas" tian ignoradon flanke de niaj gazetoj, kiuj tamen ne prokrastas distrumpeti bagatelajn sukcesojn, sendube ne senvalorajn.

I.Q. - Ĉar nia trajno pretiĝas repor-ti nin al la golfa regiono, ni devas ĉe-sigi nian dialogon ĉi tie. Tamen mi ne povas ne peti vin transdoni kelkajn



vortojn al la legantoj de Esperanto USA.

P.G. - Estu kaj esperantistoj kaj esperantoj. Kaj ne forgesu; sen pasporto oni ne povas vidi kaj ĝui la mondon. Mi esperas vidi multajn el vi dum la venontjara Universala Kongreso, kie ni esperas havi kiom eble plej multe da "pasportanoj" por la kulmino de nia projekto.

(El Esperanto USA 4/1998)

## "Tien" kun Johan Valano

Neniam antaŭe okazis al mi ke mi legis romanon nur kelkajn monatojn post la unua trailego. Sed pri la romano "Tien" de Johan Valano\* tio okazis kaj nun mi sentas emon skribi kelkajn vortojn pri ĝi al vi, kiu eble ankaŭ ŝatus fikcian libron kun multe da bonaj, interesaj, inspiraj kaj pensigaj priskriboj de la vivo.

La libro temas pri psikoterapiisto kiu ekhavas eblecon viziti "paralelan mondon", kie la homoj vivas en pli da harmonio ol en nia mondo. La ĉefa kialo de tio estas ke ili vere scias kiel nutri sin per bonaj sentoj kaj tial malofte malfeliĉas. Dum sia vizito tie la psikoterapiisto lernas multe pri ilia socio, pensmaniero kaj ankaŭ pri si mem dum spirita travivaĵo gvidita de "jumo" (titolo de tiea profesiulo, havanta la taskon regvidi homon al interna ekvilibro, do tiea paralelo al psikoterapiisto). La priskriboj de tiuj travivaĵoj kaj lernadoj vere efikas pensige kaj inspire. Estas ĉefe la koncepto pri la "nutrado de bonaj sentoj kaj la pensigaĵoj pri espero kaj dankemo, kiuj influis min multe. Sed ankaŭ la rezonado pri la evoluo de la homaro, la graveco de pardonado kaj la rakonto pri gardaĝeloj postlasis en mi spurojn agrablajn.

La lingvaĵo en "Tien" estas sufiĉe facila en tiu maniero, ke ĉefe kutimaj radikoj estas uzataj. Samtempe ĝi iel estas nefacila kaj eksterordinara. Por mi estas ĝuo legi tekston kun tiom da elegantaj vortkombinoj kaj trafaj esprimoj kiel en la libroj de Claude Piron.

Oni rimarkas en la libro ke la verkisto mem havas multege da spertoj pri la homa psiko en diversaj manieroj kaj tial la legado vere estas interesa. Kaj eble ĝi eĉ helpas iom plibonigi la nutradon de bonaj sentoj en la ĉiutaga vivo...

\* Johan Valano estas pseŭdonimo por Claude Piron.

Håkan Lundberg

## RECENZOJ

### La okcidenta-orienta akrido

Kelkaj vortoj pri interesa rememora skribaĵo verkita de William P. Vathis. William kaj lia edzino Erika estas usonano kaj malnovaj amikoj de mia familio. Fakte estis Erika kiu trovis min dum Esperanta kongreso kiam mi estis nur kvinjara. Ekde tiam ni tenis multjaran amikecon kun multaj renkontoj. Poste ŝi renkontis William aŭ pli precize lian junan filon. Tiu epizodo ne estas menciita en la libreto, kiun William verkis, sed multaj aliaj. La kajero fakte enhavas gravajn pecetojn de la frua Usona esperantomovado. Ekde la esperantiĝo kelkaj jaroj antaŭ 1940 li kun entuziasmo uzis la lingvon kaj partoprenis la movadon.

La titolo enhavas la metaforon "akrido" ĉar la teksto priskribas diversajn saltojn, kiujn la verkisto faris. Granda parto priskribas la impresojn de juna usonano dum laboro kaj vizito en Honkongo, Japanio, Tajlando kaj Makao, ĉio estis travivaĵoj dum la kvindekaj jaroj. Fakte la ĉefa teksto de la kajero estis verkita dum la jaroj 1951 ĝis 1954! Poste ili estis flankemetitaj dum kvardek kvin jaroj. Kiam William nun lasas nin informi pri liaj spertoj en junaj jaroj estas la originala teksto kiun ni povas legi, ne moderna rerakonto de ĝi.

Multaj estas la "bildoj" pri la fremda kulturo kiun li renkontis. Spertoj pri naturo, vivo, manĝoj, sporto kaj kulturo. Iom pri la tiama konsula vivo ni povas lerni. Ni eĉ povas scii ĝi pri la tiama kosto de "ĉiesulinoj" en Honkongo!

Se vi interesiĝas pri la memoraĵa libro, verkita de William P. Vathis vi povas mendi ĝis ĉe la libroservo de UEA. La kosto por unu kajero estas 7.50 guldenoj.

Gunnar Farm

### La mirinda vojaĝo de Nilĉjo Hansson en Svedio 1956

La libro estas tradukita de Christer Lörnemark.

En la originalo mi longe serĉis la nomon de la aŭtoro, kaj fine mi trovis ĝin en la fino de la lasta ĉapitro. Margareta Hansson estas la nomo de la aŭtoro. Bedaŭrinde oni ne ricevas iun informon pri ŝi aŭ pri ŝia vivo.

La libro estas interesa kaj instrua. Ĝi bone priskribas la geografion de

Svedio kaj la ŝtatajn svedajn fervojojn, kiuj en la jaro 1956 festis sian 100-jaran jubileon. La libro ankaŭ donas bonan bildon de la 50-aj jaroj, la tempo kiun ankaŭ mi memoras. La morgaŭa tago estis luma kaj plena de espero. Laboro ne mankis al junaj homoj kaj oni povis mem decidi pri sia vivo.

La originalo konsistas el mallongaj frazoj, simpla vortkonstruo kaj lingvo similas la parolan lingvon. La libro verŝajne baziĝas sur la taglibro de la verkistino skribita en la tempo kiam ŝi faris la vojaĝon.

Estas bona priskribo pri feria vojaĝo de ordinara familio en tiu tempo kiam feriaj vojaĝoj ankoraŭ ne estis tre kutimaj. Oni komprenas ke la vojaĝo faris grandan impreson kaj estis aventuro por ĉiuj membroj de la familio.

La tradukanto bone sukcesis kun sia traduko de la libro. Kun ambaŭ libroj en la mano, oni havas bonan okazon lerni multajn interesajn kaj utilajn vortojn kaj esprimojn en Esperanto.

Soile Lingman

### Reaperos Esperantologio

Paul Neergaard eldonadis inter 1949 kaj 1961 revuon kun la nomo *Esperantologio*. Christer Kiselman nun planas revivigi ĝin sub la duobla nomo *Esperantologio/Esperanto Studies*. En julio 1998 li invitis plurajn elstarajn lingvistojn kaj esperantologojn membriĝi en la redakta komitato. La revuo havas fortajn personajn ligojn kun la Akademio de Esperanto, tamen formale la revuo kaj la Akademio ne dependas unu de la alia.

*Esperantologio/Esperanto Studies* aperos en papera kaj elektronika versioj. La paperan publikigos la eldonejo Bambu Ltd en Varno, la elektronikan Upsala universitato sub la respondeco de Ingrid Maier. La retversio estos alirebla ĉe la servilo de la Matematika instituto de la Upsala universitato sub la adreso <http://www.math.uu.se/esperanto>.

Jam nun oni povas rigardi tiun paĝon, kiu enhavas pli da detaloj pri la projekto. Tie troveblas ankaŭ paĝo kun listo de la tuta enhavo de la ses kajeroj, kiujn redaktis Paul Neergaard.

Christer Kiselman bonvenigas kontribuantojn al tiu nova revuo. Li jam ricevis promesojn kaj duonpromesojn pri pluraj valoraj kontribuantoj, tamen restas iom da loko. Jen lia retadreso:

Christer Kiselman  
kiselman@math.uu.se



# Memoroj el Bordo

*Inter la 26-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto 1998 okazis la 64-a kongreso por blindaj esperantistoj en la franca urbo Bordo. Estis mia unua vizito en Francio sed ne mia lasta, mi esperas. El 13 landoj 90 kongresanoj venis por trakti la kongresan temon Niaj Sensoj, por kune diskuti komunajn aferojn dum la kunvenoj de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) kaj por ekskursi kaj kunestadi.*

Mi venis tien kune kun mia fratino Ann-Sofi kaj alia esperantisto, Birger, kaj ni vojaĝis aviadile. La vetero estis tre varia kaj precipe dum niaj ekskursoj pluvis.

El niaj membrokunvenoj mi nepre menciu al vi ke ni per silenta minuto honoris Nora Moerbeek, nian tro frue forpasintan sekretariinon de LIBE kaj la redaktorinon de nia brajla revuo Esperanta Ligilo; ŝi mortis la 17-an de marto. Ŝia vivo estas ekzemplo pri sindonemo kaj obstina lukto kontraŭ la malfacilaĵoj. Dum la unua kongresotago ŝia edzo Rob Moerbeek tre korusu parolis al ni pri ŝia vivo dum ni atendis malfruiĝantan preleganton kaj kiel nia norvega amiko Otto diris poste: "ofte improvizoj iĝas pli bonaj ol la antaŭe decidita programo".

Dum la membrarkunvenoj ni i.a. diskutis nian revuon kaj la nederlandano Jan Verheule prenis sur sin la grandan taskon fariĝi redaktoro por EL (Esperanta Ligilo) kiu nun havas 1.050 abonantojn. Ni ankaŭ estis invitataj de la germanoj al IKBE (la 65-a Internacia Kongreso por Blindaj Esperantistoj) en Berlin en 1999 en la hotelo Unter den Linden. Imponis min tio, ke ili jam trovis konvenan kongresejon.

Post la melfermo de la kongreso okazis honortrinkado kaj post tio ni iris eksteren por la kongresfoto. Sur granda vagono ĉiuj devis stari dum tiu ceremonio kaj ni svedoj troviĝis plej malantaŭe sed plej altnivele kaj almenaŭ mi post kelkaj minutoj ekhavis la senton, ke la tuta vagono eksvingis iomete. Ĉu la pli frua tosto eble petolis kun mi, mi ne kuraĝas diveni.

Kadre de la kongresa temo instruistino el Ukrainio faris prelegon en kiu ŝi prezentis diversajn teoriojn kaj provojn kiujn oni faris rilate demandojn ĉu ekzistas plian senson kiu kompensas al manko de aŭdpovo aŭ vidpovo. La ĉeestantaro ne konsentis pri ĉi tiu teorio, sed emfazis la bezonon instrui al novblindigintaj homoj uzi tiujn sensojn kiujn ili fakte havas kaj ne tro fidi teknikajn helpilojn kaj

tio rezultigis rezolucion, kiun ni pluisendu al instruistoj kaj sociaj aŭtoritatoj sur la kampo de edukado. Konforme al tio mia samlandano Birger rakontis al la kongresano pri la muzeo en Enskede, en la ejo de Synskadades Riksförbund kiu montras la historian evoluon de la vivo de blinduloj en Svedio. Mi rekomendas al vi viziton tie. Estas aventuro trairi la "ĉambron de sensoj" kiu estas tute malluma!

La ekskursoj fakte aludis al la kongrestemo, mi opinias, ĉar la duontaga ekskurso lokigis nin sur la plej alta dunego de Eŭropo, le Pilat, kie ni spertis kiamaniere sentiĝas sabloamasoj sub la piedoj kaj en la ŝuoj. Ĉe la dunego troviĝis ŝtuparo kiu multe helpis dum la grimado al la pinto, entute 160 ŝtupoj gvidis tien. La vetero estis pluveca. Tial oni ne povis vidi tre longe. Por priskribi kiel estis sur la dunego mi nur diru ke estis kiel promeni sur neĝo sed pli varme. Kelkaj kuraĝuloj banis sin dujm vizito sur la plaĝo Petit Nice ĉe la Atlantika Oceano. Ni svedoj ne apartenis al tiu kategorio. La ekskurso finiĝis per pikniko antaŭ ol ni reveturis al Bordo sed en nia aŭtobuso ne finiĝis ĉar nia rusa grupo ekkantis kaj ili ne ĉesas unuavice. Aliaj sekvis ilian ekzemplon kaj tiu vespero iĝis magia momento.

La tuttaga ekskurso havis tute alian karakteron. Unue ni vizitis la urbon Saint-Antoine de Breuilh, kiu situas 60 km oriente de Bordo. Tie ni

aŭskultis longajn kaj multajn paroladojn franclingvajn sed esperantigitajn fare de aŭtoritatoj de la urbo kaj la loka esperantistaro pri filo de la urbo, Theophile Cart; li siatempe faris multon por esperanto kaj por la blindularo ĉar li i.a. fondis la revuon Esperanta Ligilo en 1904. Poste ni enbusiĝis kaj veturis al la pitoreska vilaĝo Saint Aulé kie Theophile Cart naskiĝis kaj travivis siajn unuajn jarojn. Tie sur lia domo oni metis memortabulon kiu nun estis inaŭgurita per eta ceremonio. Du infanoj, unu francino kaj unu ruso forprenis tukon kiu kovris la tabulon. Poste ni denove enbusiĝis. Reveninte en Saint-Antoine de Breuilh ni iris en festsalonon, kie ni sidiĝis por travivi vingustumadon. Ses specojn da vino ni gustumis. Sekvis manĝo kiu konsistis el longaj sandviĉoj kaj la restanta vino. Ni fakte sentis bezonon iom promeni post tio kaj sukcesis ŝteliri el la salono kaj ni promenis eksteren kaj trovis agrablan kafejon kie ni kafumis antaŭ ol ni denove daŭrigis per la busoj, nun al prunfarmejo. Tio ja ne estis novaĵo por ni. Ni gustumis prunkonfitaĵojn ankaŭ. Jes, dum tiu ekskurso la gusta senso ricevis multajn impresojn; ni ja poste atingis vinbienon. Tie ni ĝuis gustumadon de bordozaj vinoj kaj multaj el ni kaptis la okazon aĉeti de ĝi por kunpreni hejmen. Je la oka horo vespere mi revenis en Bordo.

Ingrid Johansson  
(El Kelklinie Pri 1998:6)

## Ĉu Sydsvenskan reklamas esperanton?


La ĉefa sudsveda ĵurnalo *Sydsvenskan* komencis kunlabori kun Sveda Esperanto-Federacio (SEF) kaj ĝia interreta **Kiosko**. *Sydsvenskan* havas por siaj interretaj legantoj diversajn kolektojn da ligiloj, inter alie al aliaj gazetoj en la mondo. Ek de oktobro 1998 tio estas la Kiosko de SEF. La uzantoj havas la tutan tempon la senton, ke ili troviĝas ĉe la gazeto, kvankam ili moviĝis al la paĝoj de SEF.

*Sydsvenskan* proponas al siaj legantoj la saman

elektelecon uzi la svedan, esperanton kaj la anglan, kaj kontribuas per tio al informado pri esperanto, ĉar la komencaj paĝoj de Kiosko invitas la vizitantojn informiĝi pri esperanto, ĉu per vizito al la informpaĝoj de SEF (sur la sveda paĝo), ĉu per vizito al esperanto.net (sur la angla paĝo), kie ili povas pluelekti, en kiu lingvo ili volas legi la informojn pri esperanto.

La Kiosko de *Sydsvenskan* troveblas ĉe <http://sydsvenskan.se/links/kiosken.html>.

Franko Luin  
franko@esperanto.se





## Kristnaskaj kantoj

### NOVAJ LIBROJ DE AIRA KANKKUNEN

Aperis novaj libretoj de Aira Kankkunen.

La poemaro "Fore de siaj praradikoj ili surteriĝis" (A5, 55 p.)

"Societaj ludoj", aforismoj (A5, 39 p.)

Oni povas mendi la libretojn ĉe la aŭtorino.

La prezoj: Poemaro 25 Skr, aforismoj 20 Skr + sendokostoj.

La adreso:  
Dr Forselius  
Backe 60  
413 26 Göteborg  
Telefono 031-187982

Rete:  
<aira.kankkunen@swipnet.se>

*Parolante pri ĉi tiu lasta duobla numero de la jaro oni proponis al la redaktanto de La Espero publikigi kristnaskajn kantojn. Mi serĉis en miaj propraj kantaretoj kaj en tiuj de Esperanto-Centro sen trovi. Sekve mi decidis aŭdaci propran tradukon de svedaj kristnaskaj kantoj, kvankam mi ne konvinkigis ke ĉi tiuj kantoj ne jam estas tradukitaj. (Muziknotojn vi trovas en "Nu är det jul igen och 45 andra julvisor", S. Egnell/T. Nilsson, Bonnier Fakta Bokförlag AB, 1981.)*

### Kristnaska Pola Danco

*(Julpolska: Nu har vi ljus Här i vårt hus...; Musik: Johanna Ölander, Text: Rafael Hertzberg)*

Nun estas lum' En nia dom'  
Venis Kristnasko, hop tra la la la  
Mano en man' Dancas infan', dancas infan'  
En la domo estas la abio En la domo estas la abio  
Tra la la la la, tra la la la la, tra la la la la la la

Venu amik' Jen la muzik'  
Dancu ĉirkaŭe, hop tra la la la  
Gaja anim' Frato fratini', frato fratini'  
Paĉjo, panjo, ĉiuj povas danci Paĉjo, panjo, ĉiuj povas danci  
Tra la la la la, tra la la la la, tra la la la la la la

Dancu sen lac' Venis donac'  
De la virkapro, hop tra la la la la  
Kaĉo fiŝaj Dolĉa bakaj, dolĉa bakaj  
Kune ni kantetas post la kaĉo Kune ni kantetas post la kaĉo  
Tra la la la la, tra la la la la, tra la la la la la la

### Ĉi-vespere

*(Goder afton: Goder afton, goder afton, båd' herre och fru...; Musik och text: Alice Tegnér)*

Ĉi-vespere, ĉi-vespere, sinjor' sinjorin'  
Ni ĝojos la Kristnaskon komune ĝis fin'

Ĉi-vespere, ĉi-vespere, bonvenon al vi  
Ni ĝojos la Kristnaskon en plen-harmoni'

### Hej koboldetoj


*(Hej tomtegubbar: Hej, tomtegubbar, slå i glasen...)*

Hej, koboldetoj englasigu nur por ke ni amuziĝu!  
Hej, koboldetoj englasigu nur por ke ni amuziĝu!  
Mallongan tempon vivas ni elĉerpigante la energi'  
Hej, koboldetoj englasigu nur por ke ni amuziĝu!

### Nun la Kristnasko jes

*(Nu är det jul igen: Nu är det jul igen och nu är det jul igen...)*

Nun la Kristnasko ja kaj nun la Kristnasko ja  
Kristnasko daŭros ĝis la Pasko  
Estas ne la vero estas ne la ver'



## Auld kandidato por Nobel-premio

Ekde la 21-a de aŭgusto la gazetoj The Times, Daily Telegraph, Le Monde kaj multaj aliaj eĥis nekutiman informon: Esperantlingva verkisto estas kandidato por la literatura Nobel-premio.

Fakte laŭ iniciato de la verkisto Manuel de Seabra, William Auld estas antaŭ februaro 1999 kandidatigota fare de Esperant-lingva Verkista Asocio (EVA), Esperanta PEN-Centro kaj Internacia Esperanto-Muzeo Vieno por la Nobel-premio pri literaturo en 1999. La vortumon de la kandidata letero la komitato de EVA aprobis en Montpeliero.

La "komunikila lavango" - kiel rakontis al ni Auld - ne estas tamen merito de EVA aŭ PEN, sed de amiko lia, Norman Roberts, kiu ekruĵis la inform-pilkon tradukante artikolon de Heroldo pri Auld por loka ĵurnalo, Alloa Advertiser. Ĉi tiu aperigis intervjuon kun Auld (20 aŭg.), rimarkitan sammatene de skota novajagentejo, kiu mem telefonis por intervjuo kaj sciigis ĉiujn ĉefajn ĵurnalojn skotajn kaj britajn. Ekatentis pri la novaĵo kvin programoj de la radio BBC, gazetoj en Britio kaj - post apero de la informo en The Times - ankaŭ eksterlande. La pilko plu ruliĝas...

*(El Esperanto septembro 1998)*

## Nova estraro de UEA

Dum la UK en Montpeliero estis elektita nova estraro de UEA, evento kiu okazas ĉiun trian jaron. La estraro konsistas el prezidanto, vicprezidanto, ĝenerala sekretario kaj varia nombro da ceteraj estraranoj. Ĉi-foje post komplika procedo oni elektis nur ses estraranojn, inter kiuj nur la ĝenerala sekretario estis membro de la demisiinta estraro.

Nova prezidanto fariĝis *Kep Enderby* el Aŭstralio, vicprezidanto *Renato Corsetti* el Italio, ĝenerala sekretario *Michela Lipari* el Italio kaj ceteraj estraranoj *Petro Chrdle* el Ĉeĥio, *Kalle Kniivilä* el Svedio kaj *Gbeglo Koffi* el Togolando.

Rilate la lastan estraron ni povas konstati, ke la unuan fojon afrikano nun estas estrarano de UEA.

Red



## La 3-a Hansa Esperanto-Tago HET

### KORESPONDADO

Estonio 53-jara, esperantistino kiu lernas la svedan kaj norvegan, deziras korespondamikon. Loĝas 10 km for de Tallin kaj laboras en lernejo. Skribu al  
Aime Saarkopli  
Loo Keskkool  
EE 3001 Harju mk.  
Estonio

Inĝeniero pola serĉas korespondamik(in)on en Svedio. Interesiĝas pri Svedio kaj pri filatelo. Skribu al Jerzy Michalski  
Pocatowa 9  
26-660 Jedlinsk  
Pollando

Ĝi okazis meze de septembro en Låsby, Danio. El la 35 partoprenantoj 17 estis germanoj, 13 danoj, 4 svedoj kaj 1 usonano. Dufoje antaŭe oni aranĝis HET, 1996 en Ratzeburg kaj 1997 en Stralsund, ambaŭ en Germanio. Oni decidis venontjare aranĝi HET en Esperanto-domo de Lesjöfors, esperante ke niaj orientaj najbaroj tiam pli facile povos atingi la kunvenon.

La kunveno nomiĝas Hansa Esperanto-Tago por manifesti jenan ideon: Hanso kaj Esperanto. Oni volas kunigi la historian ideon de 500-jara paca kunlaboro kun la aktuala evoluo de la Eŭropa Unio, kiu post ĵusa pligrandiĝo norden, dum la venontaj jaroj disvastiĝos orienten. El tiu situacio levigās la demando, per kiu lingvo prefere komuniku la homoj el tiuj landoj kaj nacioj, kiuj ĉirkaŭas la Baltan Maron. Momente uzigās jenaj naciaj lingvoj: dana, estona, finna, germana, islanda, latva, litova, norvega, pola, rusa, sveda kaj aliaj etnolingvoj.

### Hansa Esperanto-ideo

Kvankam la Hanso inkluzivis la landojn de la Norda kaj Balta Maroj, oni nun koncentriĝas sur la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro (inkluzive de Norvegio kaj Islando).

La nomo Hansa Esperanto-Tago estis elektita memore al la ĉefa kunveno de la Hanso, kiu estis ankaŭ ĝia supera instanco en kazo de konflikto inter la partneroj. La Hanso metis la fundamenton de libera memregado kaj altnivela kulturo, kiuj ebligis longedaŭrajn stabilajn kaj sukcesplajn rilatojn.

Naskiĝinta en Kiel 1995, ĝi estis forumo de la ekzistantaj Landaj Asocioj kaj regionaj organizaĵoj ĉirkaŭ la Balta Maro por ebligi kunordigadon de la aktivecoj.

Unua paŝo estis diskutrodoj dum la UK '95 en Tampere kaj UK '96 en Prago. Dua paŝo estis la organizo de la Unua Hansa Esperanto-Tago en Ratzeburg en 1996, kiu renkontis bonan eĥon kun 86 partoprenantoj kaj jarkunveno de la Dana Esperanto-Asocio organizita kadre de la aranĝo.

### Celo de la Hansa Esperanto-Ideo

Oni planas organizon de Hansa Esperanto-Tago ĉiujare en alia lando, prefere alterne en okcidento kaj oriento, kaj aldone diskutrodojn pri la Hansa Esperanto-Ideo dum la UK-oj. Bone

oni povus ankaŭ uzi la jam ekzistantajn Esperanto-aranĝojn ĉirkaŭ la Balta Maro, kiuj tre sukcese okazadas en la diversaj landoj.

Ĉefa trajto de la Hansa Esperanto-Tago estu prezento de la tradicio, historio kaj kulturo de la organizanta lando.

Ni, la Esperanto-amikoj kaj niaj organizaĵoj, ĉiam denove insiste atentigu la respondecajn instancojn pri la problemo de lingva interkompreniĝo. Unu fundamenta decido de Eŭropa Unio estas la egalrajteco de lingvoj kaj kulturoj. Kiel plenumi tiun postulon? Ĝis nun ili nenion faris pri tiu temo, kontraŭe ili sugestas ke ĉio jam solviĝis per altrudo de la angla lingvo.

Vera amikeco inter homoj evoluas nur surbaze de fundamento de libervola sennombra individua interrilato de personoj, kluboj, urboj, regionoj k.t.p. Eŭropa Unio ne estos unu lando kun centralisma registaro en kiu dronos la nacioj, lingvoj kaj kulturoj, sed aro de regionoj, almenaŭ sur la kultura kampo. Per la Hansa Esperanto-Ideo oni celas plekti, densigi kaj kultivi amikajn rilatojn inter la landoj de Eŭropa Unio, ĝiaj estontaj kandidatoj kaj principe ĉiuj landoj ĉirkaŭ la Balta Maro.

La aranĝantoj de HET alvokas ĉiujn personojn, grupojn, landajn kaj fakajn organizaĵojn de la Esperantomovado en la ĉebalta regiono stabiligi kaj daŭrigi la Hansajn Esperanto-Tagojn.

Oni petas, ke vi informadu pri tiu ĉi ideo, kaj sendu al ili viajn opiniojn, proponojn kaj kritikojn!

La temo estas la egalrajteco en la internacia kunlaboro. La Esperantomovado devas aktive partopreni kaj sekvi la evoluadon en la mondo kaj precipe en nia konkreta norda regiono.

### Kontaktadreso pri la Hansa Esperanto-Ideo:

Werner Pfennig  
Uns Hüsung 29/1104  
DE-17043 Neubrandenburg  
Telefona +49-395-4221398

Christian Darbellay  
Esperanto-Kiel  
Johannesstr. 54  
DE-24143 Kiel

Baltmara kunlaboro konsistu ekzemple el:

- aranĝo de oficialaj renkontiĝoj de la Esperanto-grupoj de ĉiuj partnerurboj alterne en ĉiu unuopa urbo, kun subteno laŭeble ankaŭ financa de la urbaj instancoj.
- komuna varbado por Esperanto,

ekzemple en partnerurboj aŭ ĉe du havenurboj ligitaj de pramlinio.

- interhelpo de grupo al grupo aŭ de Landa Asocio al Landa Asocio.
- kunlaboro kun la diversaj Esperanto-Domoj (ekz. Kaunas/Litovio, Bialystok/Pollando, Lesjöfors/Svedio k.t.p.)
- datenbazo de ĉiuj aranĝoj, regulaj aŭ ne, ĉirkaŭ la Balta Maro.
- komuna varbilo por tiuj aranĝoj (simile aŭ koncize ĉe la junularo) k.t.p.

Por pretigi la datenbazon de la aranĝoj, ni petas sendi varbilon de ĉiuj aranĝoj, pri kiuj vi scias (ankaŭ pri pasintaj) al Christian Darbellay.

## La franca ĉefministro kaj Esperanto

Lionel Jospin, ĉefministro de Francio, ĵus faris oficialan viziton en Ĉinio. Antaŭ ol renkonti la ĉinajn ŝtatestrojn en Pekino li haltis en Honkongo, kie li i.a., la 26-an de septembro, faris paroladon antaŭ studentoj kiuj studas la francan. Parto de lia parolado koncernis kiujn fremdlingvojn la ĉinoj povas uzi por internacia komunikado.

Jospin diris: "Ni finfine bezonas universalan interkomunikadon, kaj, ĉar ne estos Esperanto, lingvaĵo, kiun iuj volis inventi, el ĉiuj lingvoj, estos versajne la angla lingvo. Sed ni konsoliĝu: ĉar la angla lingvo estos de ĉiuj uzata, tiu lingvo estos mistraktata kaj perdos sian originan belecon, dum la ĉina kaj franca konservos sian purecon, sed necesas, ke ne estu laboratoria pureco. Vi bezonos duan alilandan lingvon, post la angla, mi konsilas al vi elekti la francan."

Ni vidas, bedaŭrinde, sufiĉe kutiman manieron menciigi Esperanton: en subfrazo, pretere, antaŭjuĝeme kaj nescie. I.a. la aludo pri "laboratoria pureco" mesaĝas: Esperanto ne estas vera lingvo. En la citaĵo facile bildiĝas ke Esperanto ne estas uzata lingvo, lingvo kun parolkomuno, nur io (iu propono?) kreita en laboratorio ...

Kaŭze de la Jospin-a eldiro kaj pro tio ke estas bona okazo aŭdigi nin – multaj Esperantistoj reagis organizite la lastajn tagojn pere de Interreto, plej multe sabaton la 3-an de oktobro, kiu estis la Esperantista Internacia Ago-Tago ...

Christer Lörnemark  
(El Inter-ligilo 3:98)



# Ombudsmano: protektanto de rajtoj

*En la jaro kiam la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj festas la 50-jariĝon, okazis interesa prezento de la svedaj ombudsmano en seminario en formo, aranĝita de la Sveda Asocio de Unuiĝintaj Nacioj. SEF estis invitita partopreni ĝin.*

Sep el la ok instituciaj estroj rakontis pri siaj fakoj kaj respondis al demandoj.

La vorto *ombudsman* estas tre malnova sveda vorto, kiu fariĝis iom internacia, ĝuste en la signifo rajtoprotektanto. Do temas pri institucioj, parlatante fonditaj, kiuj helpas civitanon kiam ili havas kaŭzon plendi pri eraroj, misfaroj aŭ mankoj ĉe ŝtataj administracioj.

La unua ombudsmana institucio estis fondita jam en 1809. Temas pri pro-leĝa sekureco por ĉiu civitano. Pasintjare venis proksimume 5.000 denuncioj, plendoj al JO (mallongigo por la sveda titolo Justitie-Ombudsman).

En la malnova Sveda-Esperanta Vortaro oni trovas, ke JO estas tradukita per parlamenta prokuroro. Tio estas eraro, ĉar prokuroro estas oficisto, kiu havas la taskon akuzi en la nomo de la ŝtato, sed tian rajton JO ne havas. JO nur raportas kaj atentigas al la parlamento. JO nuntempe ankaŭ havas la taskon priobservi la komunumajn instancojn. La gazetaro sekvas kaj informas kiam venas gravaj kaj seriozaj denuncioj. En la JO-institucio laboras 50 oficistoj por la rajtoj de la svedaj civitanoj. Mi bedaŭras ke mi ne povas doni oficialan tradukon, kiu pli precize klarigas la taskon de JO.

Civitanoj estas ĉiutage aĉetantoj-konsumantoj. Ni civitanoj bezonas instancon kiu povas protekti nin kontraŭ malbonaj kaj danĝeraj varoj. Kvankam troviĝas bonaj leĝoj por subteni diversajn rajtojn por aĉetantoj, ni bezonas helpon kiam vendistoj ne sekvas leĝojn kaj kiam iu vendisto konscie trompas siajn klientojn.

Ekde 1973 troviĝas Konsumantombudsmano.

Homaj rajtoj implicas ke temas pri samaj rajtoj por ambaŭ seksoj. Tion kredas la homoj en Svedio, kaj ni havas leĝojn kiuj klare esprimas tion. Ni scias, kun granda bedaŭro, ke leĝoj ne garantias ke ĉiu homo (viro en tiu ĉi kazo) ĉiam obeas leĝojn. Por sekurigi la leĝajn rajtojn de la svedaj virinoj, nun troviĝas ekde 1979 ombudsmano por kontrolo de egaleco inter viroj kaj virinoj. Enmigrintoj kaj rifuĝintoj kiuj venis al Svedio el landoj, kie oni tute ne traktas virinojn egalece, spertas problemojn, kiam ili komprenas ke la svedaj leĝoj ankaŭ estas validaj kaj devigaj por ili.

Al Svedio venis dum la jaroj miloj da homoj, kiuj fuĝis pro milito aŭ pro persekutado. En Svedio troviĝas multaj etnaj grupoj kiuj ricevis permanentan restadpermeson. La parlamento ne volas akcepti ke indiĝenaj svedoj, precipe entreprenaj dungistoj, diskriminacias homojn pro ekstersvedia origino.

1986 la parlamento nomumis la unuan Diskriminaci-Ombudsmanon por trakti problemojn pri etna diskriminacio.

Infanoj ankaŭ havas rajtojn en la socio, sed infanoj ne estas kapablaj defendi siajn rajtojn same kiel adoltoj. Por substreki ke infanoj havas rajtojn la parlamento fondis ankoraŭ alian institucion rajtoprotektan, Infan-Ombudsmanon, en la jaro 1993.

Ekster la parlamenta sfero ekzistas alispeca ombudsmano, *Pressombudsman*. En svedio regas preslibereco jam de longa tempo. Preslibereco, ne nur signifas, ke gazetposedantoj kaj ĵurnalistoj rajtas opinii kaj skribi kion ajn, sed tiu libereco apartenas leĝe al ĉiu civitano. Preslibereco ne signifas ke vi rajtas skribi ofendi aŭ vundi iun, kiam tia ofendo transiras la limon kaj fariĝas afero por tribunalo, kondiĉe ke la ofendito denuncas la ofendinton.

Ĵurnalistoj estas organizitaj same kiel gazet- kaj libroeldonistoj estas. Personoj de tiuj kategorioj, kaj aliaj kiuj laboras en tiu sfero, ekzemple re-

daktoroj de televidaj programoj, povas partopreni en la Publicista klubo. Tie okazas la diskutoj pri presetiko kaj profesia moralo. Oni tie starigas regulojn kiujn publicistoj prefere obeu.

Gazeteldonistoj, ĵurnalistoj kaj la Publicista klubo iam fondis fonduson, kaj tiu fonduso pagas por ombudsmano, kiu intervenas kaj helpas kiam kiu ajn civitano venas al PO kun pravigita plendo (450 en unu jaro).

Truviĝas multaj etikaj reguloj kiujn ĵurnalistoj kaj ĉefredaktoroj devas sekvi, pro la simpla fakto ke ili mem starigas la regulojn.

Kiam Svedio fariĝis membro en la Eŭropa Unio, oni starigis ombudsmanon por tiu granda batalkampo. Tiu persono ne povis veni por prelegi.

La aŭskultantaro (ĉ. 60 personoj) ricevis poste mallongan konkludan pritrakton de la prezidanto de SNF, Viola Furubjälke, sveda parlamentano.

Mia demando al JO kaj samtempe DO, tuŝis la problemon por enmigrintoj, kiuj ne povas paroli kaj kompreni la svedan lingvon, kiam ili devas kontakti ŝtatajn aŭ komunumajn instancojn – inkluzive tribunalojn. Truviĝas tradukistoj por tiaj kontaktoj, sed malgraŭ tio alvenas plendoj kaj denuncioj al la Ombudsmano de etna diskriminacio (DO).

Roland Lindblom

## Svenska FN-förbundet och esperanto

### Stöd för esperanto

1953 gjordes en stor namninsamling för esperanto till FN. Ett stort antal internationella organisationer och enskilda personer lämnade en petition till FN. Den behandlades vid en FN-konferens 1954. Detta ledde till att Internationella Esperantoförbundet fick konsultativ status i UNESCO. Förbundet har samarbetat med UNESCO på vissa områden och generaldirektören har visat personligt intresse. Förbundets årskongresser har besökts av UNESCO-representanter, och generaldirektören sänder alltid ett telegram till

Yngve Sörman en Stokholmo estas esperantisto kaj ankaŭ estrarano de la Svedaj Mondfederalistoj. Jam la pasintan jaron li iniciatis informleterojn de la Sveda Esperanto-Federacio adresitaj al la kulturministro Marita Ulvskog, la ĉefepiskopo K.G. Hammar kaj la ĉefkomandanto Ove Wiktorin.

Li nun ankaŭ estas la aŭtoro de membra propono al la Sveda UN-Federacio. Jen ekstrakto el la propono kaj la respondo:

*Motion till Svenska FN-förbundets kongress 1998 från Yngve Sörman, medlem i Stockholms FN-förening*



årskongresserna...

Det borde vara självklart att Svenska FN-förbundet uttalar ett tydligt stöd för esperantos vidare utbredning. UNESCO uppmanade alla internationella organisationer att använda sig av esperanto, vilket kan läsas i en resolution från 1985. Medlemsländernas regeringar uppmanades samtidigt att informera om esperanto i alla skolor.

Med hänvisning till det anförda hemställs att kongressen uttalar Svenska FN-förbundets stöd för det neutrala internationella språket esperanto.

Stockholm 1998 januari 16  
Yngve Sörman

### Förbundsstyrelsens yttrande över motionerna 17 och 18, föredragande Birgit Ericsson

Språkfrågan har alltid varit ett problem i kommunikationen emellan människor av olika språkgrupper. Esperanto konstruerades för mer än hundra år sedan av den polsk-judiske läkaren L. Zamenhof som ett internationellt hjälpspråk. Grundorden, ca 1000 har hämtats ur kulturspråken särskilt engelskan och franskan. Esperanto har visat sig vara praktiskt användbart i tal och skrift och är ett av de konstruerade språk som lyckats bäst och har vunnit ett stort antal anhängare jorden runt.

Vi gläder oss åt de framgångar och uppmuntran av betydande personer som esperantoförbundet erhållit genom årens lopp och Internationella Esperantoförbundets konsultativa status i UNESCO och i UNESCO-resolutionen från 1985. Då esperanto vunnit ett stort antal användare runt om i världen har språket bidragit till internationell förståelse och främjat kontakten mellan människor i skilda länder. För detta arbete är det internationella språket esperanto värt allt stöd och erkännande.

Förbundsstyrelsen anser att för skapande av ett globalt språk måste kraven ställas annorlunda än vid esperantos tillkomst som endast bygger på de västerländska språken. IFN-arbetet har språkfrågan lösts genom att ge parallell status åt ett antal "stora" språk från skilda delar av världen. Kunde ett gemensamt språk införas delar vi motionärernas uppfattning att stora kostnader skulle sparas på översättningar.

KONGRESSEN FÖRESLÅS BESLUTA att yrkandena i motionerna 17 och 18 anses besvarade med förbundsstyrelsens yttrande.

## NEKROLOGOJ

### Anna Sandgren 1907 – 1998

Dimanĉe la 30-an de aŭgusto Anna mortis en la malsanhejmo de Hallsberg. La 3-an de novembro 1997 Kerstin Gelang, Karl Buremo, mi kaj kelkaj geamikoj de la Bäcksjö-preĝejo en Östansjö havis la plezuron gratuli Anna je ŝia 90-a naskiĝtago. Anna iĝis tre goja pro multaj vizitoj.

Maloŝte iu havis tiel okazoriĉan vivon kiel Anna kaj tio dank' al Esperanto. Ŝi naskiĝis en Ala sur Gotlando. Post kurso en Vätterbygdens Popolaltlernejo en Jönköping Anna deĵoris kiel kuirhelpanto unue en sanatorio kaj poste en la malsanulejo de Maria en Stockholm.

UEA havis sian jarkongreson en Stockholm 1934. Tiam Anna vizitis sian fraton, kiu partoprenis en la kongreso. Ŝi tuj decidis lerni Esperanton. Ŝi iĝis membro de Stockholma Rondo de KELI. Tie ŝi enamiĝis al viro kaj ili decidis preni la nomon Alamo. Bedaŭrinde Fritz Alamo mortis post mallonga malsano en novembro 1942.

Erik Carlén, kiu estis unu el la iniciatintoj de la sveda sekcio de KELI, dungis Anna kiel vojaĝanta sekretario. Somere la ĉeĥa ŝtato invitis Anna Alamo por prelegserio pri Svedio. Iĝis 60 prelegoj, iufoje por ĉ. 1.000 aŭ-

skultantoj. En Svedio Anna multe vojaĝis kaj rakontis pri la mizero en la militdetruitaj landoj. Oni kolektis monon por donacpakajoj. Samtempe ŝi ricevis subtenantojn kaj je kursoj en Esperanto la nombro de KELI-membroj rapide kreskis. Iam la sekcio havis pli ol 500 membrojn.

Dum prelegvojaĝo Anna ekkonis Karl-Olof Sandgren. Ili geedziĝis en 1948. Kune ili fondis Esperanto-Mision. Karl-Olof tradukis predikojn, studmaterialon por la Navigantoj k.t.p. Per sia letermisio ili atingis pli ol 130 landojn. Al esperantistoj en la komunistaj landoj Anna sendis multajn pakajojn. Post la morto de Karl-Olof la 4-an de jan. 1990 la misia agado malkreskis kaj Anna serĉis posteulon. Nuntempe K. Leja en Pollando respondas por la misio kaj presas ankaŭ la internacian organon de KELI, Dia Regno.

Dum la ekumena kongreso en Gostyn, Pollando, ni decidis transdoni la reston de la kaso por Esperanto-Misio al la kaso de la Internacia KELI. Tiam ĝi atingis pli ol 72.000 kronojn.

La funebra diservo okazis en la misia preĝejo de Östansjö marde la 15-an de septembro. Je la memorhorro estis multaj paroloj kaj mi parolis kiel estrarano de KELI.

Arne Lundkvist

### Karl Söderberg

Tre kara samideano forpasis la 19-an de oktobro.

Karl Söderberg naskiĝis 1903 en la provinco Värmland. Kiel studento ĉe la universitato de Uppsala li fariĝis prezidanto de la studenta organizo. 1929 li aŭskultis prelegon pri esperanto de Henrik Seppik, kaj li fariĝis esperantisto. Jam 1934 li eniris en la direkcion de la Esperanto-Instituto kaj 1940 li fariĝis ĝia prezidanto. Li bone ligis kontakton kun la registaro, kiu siavice asignis monon por reprezentanta esperantisto ĉe la universalaj kongresoj de UEA. Liaj radioprelegoj komenciĝis en 1934.

Karl Söderberg interesiĝis pri politiko kaj fariĝis deputito en la deputitaro de Uppsala. Li fariĝis vicprezidanto kaj poste ankaŭ transprenis la prezidantecon.


Li estis aktiva en multaj komunumaj komisionoj, ankaŭ en kelkaj ŝtataj. Lia intereso por kulturaj aferoj estis tre granda, kaj li iniciatis urbajn teatrojn en Uppsala kaj Gävle, kunlabore.

Karl Söderberg laboris kiel direktoro super la lernejoj en Uppsala kaj samtempe funkciis kiel tre aktiva kaj energia politikisto. Krom tio li ĉiam trovis tempon por esti aktiva kiel esperantisto. Ne nur "bonan-tagon-esperantisto", sed sur alta lingva nivelo kiel ano de la Esperanto-Akademio. Surprizis neniu ke li fariĝis honora membro de UEA.

La adiaŭa ceremonio okazis en Uppsala la 29-an de oktobro. Ĝi estis simpla, mallonga sed digna. Nur filino parolis. Neniu defilo antaŭ la ĉerko, nur muziko kaj voĉlegado de la konata aktoro Palle Granditzky. Multaj homoj ĉeestis, kaj el ili pluraj prezentis organizaĵojn, inter alie la universitaton, la urbon kaj la socialdemokratian partion. Akademio de Esperanto estis reprezentita de la vicprezidanto profesoro Christer Kiselman.

"Dagens Nyheter", la plej granda tagjurnalo en Svedio havis artikolon pri Karl Söderberg. En ĝi ankaŭ estis menciite ke Söderberg estis aktiva en la esperantomovado.

Roland Lindblom



Karl Söderberg



# Esperantoinfanoj vojaĝantaj

*Evald Olsson, f.d. ystadsbo numera boende i Bengtsfors i Dalsland, har som brevvän en esperantolärare i Tjeckien. Hon for med sina elever, mellan nio och arton år gamla, till Belgien och ger oss en skildring av sina erfarenheter.*

## Nia vojo al Belgio

En la jaro 1997 realiĝis en Romo kaj Rimini IKUE-kongreso [IKUE = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Red.]. Tie parolis Flory Witdoeck pri pormalriĉula agado de E-katolikoj en ilia lando. Mi proponis al ŝi mian infanan E-grupeton kun ĝia programo.

Flory jesis kaj de la 5-a ĝis la 15-a de junio 1998 ni vizitis la ĉarman maran banlokon Oostende en Belgio.

Feliĉe ni ĉiuj atingis Pragon kaj buson al Oostende. La vojo estis agrabla, kvankam ni veturis en 18 horoj 30 minutoj ĝis mateno. Nur antaŭ Gent kaptis nin terura fulmotondro kun grandaj glaciaj hajloj. La ŝoforo devis halti. Sed poste eĉ ne haltis ke ni povu lavi nin, kaj en Oostende ni estis pli frue je duonhoro. Kompreneble neniun atendis nin. Ni atendis pli ol unu horon kaj duonon. Iu gardis valizojn, iu serĉis Flory, pri kiu mi parolis kiel pri treege moderna bele vestita sinjorino. Kun Pavel mi iris serĉi alian haltejon de eksterlandaj busoj pensante ke gesamideanoj nin atendas tie. Mi neniun tie trovis. Malgraŭ tio ni kun Flory kaj oostendaj gesamideanoj kunvenis. Iu ekparolis esperante al ni!

Pluvego kaŭzis ke Flory alvenis en gumaj botoj kaj malnova jako sen esperanta flago. Kvankam ŝi sidis proksime de ni antaŭ stacidomo, neniun trovis ŝin. Miaj infanoj male sidis proksime sur mia esperanta ĉapelo kaj neniun ekkonis ilin. Post feliĉa kunveno gesamideanoj montris al ni E-klubejon La Konko kaj tie ni komune tagmanĝis. Posttagmeze alvenis familioj, kiuj volis akcepti niajn geĝupanojn.

## Meso, velŝipo, dancoj, esperanto

Dimanĉe la 7-an de junio niaj infanoj ĉeestis sanktan meson en katedralo de S. Petro kaj Paŭlo, kie estis unua sankta komunio de infanoj el Oostende. La infanoj tie eĉ kantis kaj ludis pri plimultigo de panoj. Jana kaj Iva diris, ke ili konas vojon al preĝejo kaj alvenos baldaŭ, sed ni vane ilin atendis. Ili staris dum du horoj ĉe kulturdomo kaj atendis male nin. Al tagmanĝo ili feliĉe alvenis en domon de Flory. Al mi plaĉis, ke kun infano ĉiam iris unu el gepatroj al sankta komunio. Post la sankta meso estis soleno en lernejo, kiun infanoj vizitadis. Ni en katedralo ricevis rozkolorajn rozojn. Al la infanoj

ni donis marcipanojn. Posttagmeze estis vizito en la velŝipo Merkator, nun uzata kiel muzeo. Antaŭe servis kiel lernŝipo por maristaj oficiroj. Ni interesiĝis pri ĉio, neniun el ni vidis tiel grandan velŝipon. Sur fotoj estas videbla ekzercado de estintaj lernintoj, la vojo de la velŝipo kun la korpo de P. Damiano, de komandantoj, ĉambretoj por trupo, por kuracisto, por operacioj, specialaj tubetoj por paroli kun maristoj en la subo de la ŝipo k.t.p. Al mi tradukis tekstojn en esperanton mia amiko André, kiun invitis Flory. Li restis kun ni ĝis vespero, eĉ promenis kun ni ĉe la maro.

Lunde la 8-an de junio antaŭtagmeze nia grupo kunvenis en E-klubejo. Tie ni ekzercis programon, ĉar atendis nin prezentado en lernejoj kaj kluboj. La lernejojn ni ekkonis diverstipajn; ŝtatajn, urbajn kaj ekleziajn. Antaŭ tagmezo ni iris al la lernejo Lagere School Gemeenschapsonderwijs Stene. Ni tie tagmanĝis kaj preparis por prezentado. La planko en la granda gimnastikejo estis tro glata kaj niaj dancantinoj /al ĝojo de publiko / faladis. La programo en la lernejoj estis simila dancoj el orienta Ĉeĥio kaj naciaj kutimoj.

Marde la 9-an de junio ni vizitis eklezian lernejon Sint Andreasinstituut Lager Onderwijs, kiu aspektis vere bele. Eĉ ĝi havis teatron kun scenejo en angulo kovritan per bruna veluro. Niaj knabinoj jam dancis sen akcidentoj, ĉiuj ludis bone, la publiko estis atentema.

Merkredo la 10-an de junio estis escepta tago. Ni veturis kun Flory kaj Walter al Brugge. Tie ni vizitis eminentan lernejon por kuiristoj, bakistoj, sukeraĵistoj, buĉistoj kaj hotelistoj. Proksime de la enirejo la infanoj admiris grandan ĉokoladan kangurumon.

En manĝejo ni manĝis riĉan tagmanĝon preparitan de gelernantoj el la kuirista lernejo. Ni ricevis tiom da bongusta glaciaĵo, ke la infanoj ne povis ĉion manĝi. Posttagmeze proponis al ni gesamideanoj el Brugge ŝipveturadon kun trarigardo de urbo konata kiel la plej bela el belgaj urboj. S. Rosa rakontis al ni pri urbaj memorindaĵoj. Al la infanoj bedaŭrinde pli plaĉis cignoj kaj anasidoj ol belaj domoj. Vespere ni kunvenis kun aliaj gesamideanoj kaj post vespermanĝo ni trarigardis diapozitivajn en domo, kie kunvenadas diversaj societoj.

Ĵaŭde la 11-an de junio. Nia celo estis Conscienceschool. Tie instruas esperanton al infanoj Els. Nia grupo kunvenis kaj parolis kun junaj gesamideanoj. Ambaŭ grupetoj interŝanĝis adresojn kaj promesis korespondadon. Post tagmanĝo estis nia prezentado en gimnasitkejo. Ĉio iris glate, nur dum "Paska lundo" perdis Jakob batanta knabinojn per verga batilo ĝian ornamon-rubandojn. Gelernantoj kun sia instruisto bele ludis al ni flautojn kaj la plej junaj dancis. Por paroli kun ni alvenis redaktoro el iu ĵurnalo.

Vendrede la 12-an de junio estis lasta prezentado en la lernejo Van Glabbeschool, kiun antaŭ sia pensiuliĝo estris Raymondo Wylleman. Ankaŭ en tiu lernejo infanoj lernis Esperanton. Ili preparis por ni surprizon - fruktan salaton. Niaj infanoj povis provi programon en scenejo post tagmanĝo. Ili uzis tion kaj la prezentado estis jam preskaŭ sen eraroj.

## Adiaŭo

Sabate la 13-an de junio atendis nin vizito de urbdomo, akcepto de reprezentantoj de Oostende kaj oficiala disadiaŭo kun niaj eminentaj gastigantoj. Niaj geknaboj alvenis en naciaj kostumoj. La reprezentantoj parolis kaj niaj infanoj kantis tri kantojn; ĉeĥe, esperante kaj nederlande. Plej multe plaĉis al ĉiuj danka nederlanda kanto. Al niaj infanoj instruis ĝin Raymond dum tuta semajno. Ni transdonis donacojn al la reprezentantoj de la urbo kaj al la gastigantoj marcipanojn, keramikon kaj rozojn, kiujn ni bedaŭrinde ne mem aĉetis. Posttagmeze ĉiuj pakis valizojn kaj uzis la tempon por lastaj promenoj.

Dimanĉe la 14-an de junio je la 10-a horo nia E-grupo, denove en naciaj kostumoj, kunvenis en kliniko de Sankta Jozefo, kie Flory kaj ŝiaj geamikoj ofte helpas al malsanuloj. Komence ni ĉeestis sanktan meson en klinika kapeleto. Gehelpantoj veturigis malsanajn homojn sur rulseĝoj kaj kelkajn eĉ sur litoj. Sanktan meson eblas vidi ankaŭ en la ĉambroj, ĉar kontraŭ altaro estis kamero. Ĵus estis festo de patroj kaj pri tio parolis unu el la ĉeestantoj post evangelio.

Post bongusta tagmanĝo en kafeferio de la kliniko ni ĉiuj ricevis po du belaj, sed pezaj kaj grandaj donacetoj.



Kiam ni hejme rigardis en kofreton kaj saketon, nia surprizo estis grandega. Ni trovis tie ĉion, kion bezonas panjo iranta hejmen kun bebo - eĉ pulvoron por lavi, kelkajn suĉpecojn, fruktan manĝaĵon, librojn pri bebzor- go k.t.p. Ni lastfoje disiris en niajn hej- mojn en Oostende kaj ĉiuj provis plej- parte sensukcese enpuŝi ambaŭ donacetojn en sian kofron. Feliĉe niaj gastigantoj veturis kun ni al la staci- domo, kie estas la haltejo de la ĉeĥa buso. En la stacidomo ankoraŭ last- foje kantis geknaboj por Flory neder- landan kanton kaj ŝi sonbendigis ĝin. La buso alveturis - lastaj salutoj, kisoj, invitoj al vizito de ni. Ni esperas, ke ni denove kunvenos.

Feliĉe ni atingis la hejmon. La infan- ojn rakontis pri siaj travivaĵoj kaj iliaj gefratoj decidis, ke ili ankaŭ kome- nos lerni esperanton.

Zdenka Novotna

## Aktuale en Karlskoga

La Esperanto-fako de Karlskoga Pop- ola Altlernejo komencis sian laboron 1988 kaj ekde tiu jaro studentoj el 38 nacioj studis Esperanton en la fako. La plimulto studas dum tuta semes- tro, sed kelkaj nur studas dum ok se- majnoj por iam pli malfrue reveni por finstudi la kurson. 22 horojn se- majne oni studas enklase inkluzive 4 lecionojn en nia lingvolaboratorio.

Post kvar monatoj ili faras la Lerne- jan Internacian Esperanto-Ekzame- non, kiu estas propedeŭtika al la UEA-ekzameno. Multaj jam uzis sian ekzamenon por instrui eĉ eksterlan- de aŭ en internacia laboro. Ekzemple laboras hodiaŭ Ralf Frölich en la ju- nulara konsilantaro de EU pri politi- kaj, eksteraj rilatoj kaj antaŭ kelkaj jaroj estis Sara Karlsson en Bona Es- pero en Brazilo por dum 6 monatoj instrui Esperanton. Same faris pli poste Andrea Forman el Danio, Ŝi re- venis kiel sperta instruistino kun multe da mem verkitaj kantoj en Es- peranto.

Lastsemestre faris la ekzamenon studento el Ĉinio, Basheng Chen. Post la kvarmonata Esperantostuda- do li ekstudis la svedan. Post tri se- majnoj (!!!) li estis intervjuita de ĵur- nalistoj de sveda ĵurnalo kaj la sveda ŝtata radio. Li tute bone komprenis la demandojn kaj povis respondi - en la sveda!!! Normale daŭras jarojn por studento el tia fremda lingvokulturo esti kapabla tiel paroli. "Mi metis la E- strukturojn sur la novan lingvon", li klarigis. La intervjuo en la radio estas dokumentita.

Kia giganta malŝparo estas pri

## 15-a Internacia Festivalo

La populara aranĝo por familioj kaj personoj 25 - 55 jaraĝaj en germana Saarbrücken 27 dec. 1998 - 3 jan. 1999, inkludas viziton al najbara franca urbo Metz.

Kadra temo: Hobioj. Pri kadra kaj aliaj temoj prelegos i.a.: Alyona Aristova, K.-D. Albrecht, d-ro W. Bor- mann, fam. Ebel kaj Gabalda, Ahman Junusov, A. Lászay, Laima Möller, Ahmad Nagizadeh, fam. Moon-Nour- mont, Grazina Opulskiene, P. Peera- erts, Wim Posthuma, Barb. Poterucha, fam. Reinwart, Harald Schicke, fam. Spoljarec, Frank Ubik, Marc Van- den Bempt, Terence Watts, Yasho- vardhan.

lingvolernado en lernejoj tra la tuta mondo, ne uzi Esperanton kiel propedeŭtikan lingvon!

Eĉ studentoj el aliaj fakoj en la lerne- jo, ĉiam aŭskultante la viglan babiladon de la E-klaso, en la kaŝejo, manĝejo kaj loĝejo, entuziasmiĝas kaj ekstudas E-n en rondo. Estas inte- rese noti, ke pli kaj pli da gimnazianoj faras specialajn laborojn pri Esperan- to en siaj lernejoj kaj multaj eĉ aliĝas al niaj kursoj. Multaj instruistoj hodiaŭ instigas siajn studentojn skribi pri Esperanto. Multe okazis koncerne Esperanton dum la lastaj 10 jaroj. Speciale post la 5 informprogramoj en la Sveda Edukradio malmultaj kri- tikas Esperanton, male esprimas sian intereson pri la lingvo.

Antaŭ kelkaj semajnoj 2 klasoj kun instruistoj el la Popola Altlernejo de Ingensund en Värmland vizitis la E-fa- kon en Karlskoga por aŭskulti kaj informiĝi. La okazaĵoj en Helsingborg montras al la sama intereso ĉe stu- dantoj, kiuj en granda gimnazia kla- so ekstudis Esperanton. Same okazas eksterlande. La 4an de novembro ĉi- jare la granda franca ĵurnalo Le Mon- de havis pri Esperanto tutpaĝan arti- kolon, kie gejunuloj esprimas poziti- vajn opiniojn pri la planita lingvo Es- peranto.

En la nuna tutsemestra kurso en Karlskoga estas studentoj el Ĉinio, Ja- panio, Tanzanio, Ugando, Ĉekio, Da- nio, Norvegio kaj Svedio. Ili nun pre- paras sin por la ekzameno en decem- bro...

Karlskoga 1998 11 09  
Lars Forsman

## ESTONTAJ ARANĜOJ

La urba centro (kun magazenoj, vidindaĵoj) estas relative proksima, nur ĉ. 30 min. piede. Dufoje, sub ĉiĉe- rono de sarlandaj esperantistoj, ni okazigos urban promenon kun vizitoj kaj detalaj klarigoj. Ni klopodas ankaŭ pri vizito al bierfarejo, katolika diservo en Esperanto, saŭno- kaj naĝejoj vizitoj k.t.p.

En nia tuttaga ekskurso (30 - an de decembro) ni vizitos aŭtobuse la naj- baran francan urbon Metz, kun urbaj promenoj kaj tagmanĝo en romanti- ka gastejo en kiu ni ofertas tripladan, tipe lorenan menuon. La tagmanĝo kun unu laŭdezira trinkaĵo estas in- kluzivita en la biletprezco. Restas nur ankoraŭ kelkaj lokoj!

En nia distra kaj vespera pro- gramo ni invitas vin al "Dimanĉa Koncerto" (Interkona Vespero) kaj kantvespero kiujn prezentos hungara kantistino Anjo Amika, ni prezentos palatinan vinfeston kaj belgan bier- vesperon, ĝuu kun ni la silvestran bal- on kun granda silvestra bufedo (ban- kedo) kaj novjaron "brunĉon", krome atentos vin nacia kaj folkloro vespe- roj, magio kaj ludoj.

Nia etosoplana (kaj fama) IF-gaste- jo "Knajpo" atendas vian ĉiutagan (kaj ĉiunoktan) viziton, ĝuu diversajn bierojn, vinojn el Palatinato kaj Lore- no, niajn posttagmezajn kafo-ofertojn kaj vesperajn kolektojn. Invitu viajn geamikojn al "verdolino" kaj/aŭ "ruĝul-ino", festu kun ni en amika rondo!

Kiel kutime, niaj infanoj ĝuas apar- tan programon kaj prizorgon (kun pluraj kompetentaj personoj).

### Kotizoj en DM/DEM

La kotizo rilatas al unu persono kaj inkludas: programon, loĝon, man- ĝojn kaj silvestrajn bufedon kaj balon.

| Aĝo     | - 30/11 | 1/12 - |
|---------|---------|--------|
| 0 - 2   | -       | -      |
| 3 - 5   | 240     | 250    |
| 6 - 13  | 310     | 320    |
| 14 - 24 | 380     | 390    |
| 25 -    | 520     | 550    |

Adreso de la organizanto kaj pagebl- eco:

Hans-Dieter Platz  
Postfach 1148  
DE - 343 03 Niedenstein  
Germanio  
Tel. 009-49-5624-8007 (poŝtel. 009-49-171-4964558)  
Telefakso 009-49-5624-322  
Interreto <http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm>  
Germania poŝtĝirokonto 91856-676 (BLZ 54510067 en Ludwigshafen) je nomo H.D. Platz.



# Prenumerationer

Svenska Esperanto-Förbundet erbjuder medlemmarna att prenumerera på esperantotidningar för 1999. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 - 5 SEF Specialkonto samt att på talongen ange vilka tidningar som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

**Lisbet Andreasson**  
Södra Rörum 455  
242 94 HÖRBY  
tel. 0415 - 501 52

| Tidning              | nr/år        | pris (kr) |
|----------------------|--------------|-----------|
| El Popola Ĉinio      | 12           | 295       |
| Esperanta Finnlando  | 6            | 125       |
| Esperanto            | 11           | 275       |
| Esperanto-Dokumentoj | 10           | 215       |
| Esperanto en Danio   | 5            | 125       |
| Eventoj              | 23           | 315       |
|                      |              | (f365)    |
| Fonto                | 12           | 255*      |
| Heroldo              | 16           | 260       |
|                      |              | (f345)    |
| ICM                  | 4            | 170       |
| Informoj de EAE      | 4            | 75*       |
| Juna Amiko           | 4            | 95**      |
| Komencanto           | 8            | 110       |
| Kontakto             | 6            | 165       |
| Kulturaj Kajeroj     | 4            | 125       |
| La Jaro (kalender)   | -            | 4         |
|                      |              | (f64)     |
| La Kancerkliniko     | 5            | 185       |
| La Ondo              | 12           | 205       |
| Literatura Foiro     | 6            | 240       |
| Litova Stelo         | 6            | 100       |
| Monato               | 12           | 335       |
|                      |              | (f385)    |
| Norvega Esperantisto | 6            | 85        |
| Oomoto               | 2            | 75        |
| Ret-Ventoj           | nästan dagl. | 190†      |
| Rok-gazet'           | 1            | 145††     |
| Scienca Revuo        | 2-3          | 200       |
| TEJO Tutmonde        | 4            | 85        |

f flygpost

\* Priser för 1999 har ännu inte meddelats. Højningar kan ske.

\*\* Rabatt vid mer än ett ex.

† Meddela din e-postadress

†† För fyra nummer

Ĉion bonan en la lasta jaro  
de la dua jarmilo  
deziras la estaro de SEF



# UEA-avgifter

Avgifterna för 1999 är följande:

|             |  |            |
|-------------|--|------------|
| <b>MA</b>   | Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår! | 430 kr     |
| <b>MJ</b>   | Direktmedlem med årsbok. Under 30 år, samma som MA.  | 170 kr     |
| <b>MG</b>   | Direktmedlem med Gvidlibro. Ger inte nersatt kongressavgift.   | 70 kr      |
| <b>SZ</b>   | Avgift för Societo Zamenhof, särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA  | 860 kr     |
| <b>PT</b>   | Patrono de TEJO, får Kontakto.   | 510 kr     |
| <b>DM</b>   | Dumviva Membro, betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken.  | 10 750 kr  |
| <b>DPat</b> | Dumviva Patrono, betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i Societo Zamenhof.                | 107 500 kr |
| <b>DPT</b>  | Dumviva Patrono de TEJO, betalar för hela livet och får Kontakto.  | 12 750 kr  |

postgiro: SEF specialkonto, Hörby 14 74 29 - 5

Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel. 0415 - 501 52

## Avgifter UK i Berlin 1999

Anmälningsavgifter i svenska kronor

|   | t.o.m.<br>31 dec. | 1 jan -<br>31 mars | efter<br>1 april |
|---|-------------------|--------------------|------------------|
| 1. Icke direkt medlem i UEA   | 1.590             | 1.915              | 2.235            |
| 2. Direkt medlem i UEA (ej MG)  | 1.270             | 1.505              | 1.760            |
| 3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född efter 1/11969), som inte är medlem i UEA | 970               | 1.160              | 1.355            |
| 4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA                           | 645               | 750                | 880              |

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 31/12 1978 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgiften komma att justeras.

Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:

**Lisbet Andreasson**  
Södra Rörum pl 455  
242 94 Hörby  
tel. 0415 - 501 52

Blankettten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet Specialkonto

## SEJU serĉas loĝejon!

Da apartaj loĝejoj en Stokholmo aŭ Gotenburgo estas bezonotaj dum tri monatoj, komence de januaro aŭ pli malfrue.  
Tio pro la kunlaboro inter SEJU kaj junaj esperantistoj en Nepalo, kadre de LSU (Landsrådet för Sveriges Ungdomsorganisationer).  
Ni interŝanĝos projektulojn, kiuj laboros pri la esperantomovado de la junuloj ĉefe per lerneja informado en Svedio.

Kontaktu:

Antonia Bernhard  
Creutzg. 3  
112 44 Stockholm  
tel. 08 - 618 45 24





**Sten Svenonius  
Vendelsfridsg 4C  
21764 Malmö**

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**REBUSO**

(Solve de la rebuso 98/1: Ĉampiono kun unu poento)



**KRUCVORTA ENIGMO**

|    | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 2  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 3  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 4  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 5  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 6  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 7  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 8  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 9  |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |
| 10 |   |   |   |   |   |   |   |   |   |   |

**Horizontale**

- 1 En belaj panoramoj
- 2 Iam Persujo - Eble nur utopio
- 3 Disigantan
- 4 Atingaj' - Movo
- 5 Regiona malsano - Verbofinaj'
- 6 Regulo - Faro
- 7 En Odro - Pseudoscience pri raso
- 8 Averte - Mov'
- 9 Greka liter' - Rifuzonto
- 10 Romia di' - Gas'

**Vertikale**

- A Povas uzi lernantoj
- B Pli malrapide ol kuri - Modelo
- C Viro - Malgranda Ĉ Sciigeman
- D Fadenkunlige - En glacirivero
- E Ne tiuj, sed... - Pec'
- F Itala river' - Arkon
- G Formovi tra aero - Finaj' de verbo - Maljes
- Ĝ Organ' de animalino - Fiktiva afero
- H Atmosfertavolon

**Malferma tago ĉe UEA rompis ĉiujn rekordojn**

La naŭa malferma tago en la Centra Oficejo de UEA, la 28-an de novembro, allogis 150 vizitantojn. Tio estas nova rekordo, kiu multe superas la antaŭan (120). Pro la fizikaj limoj de la domo de UEA la nova rekordo apenaŭ plu estos superebla.

La ĉefa gasto estis Claude Piron, kiu fascinis la aŭskultantojn per du prelegoj pri siaj spertoj i.a. kiel interpretisto, kiuj donis al li, kaj sekve al liaj aŭskultantoj, abunde da argumentoj pri tio, kial Esperanto estas "la bona lingvo". Lusi Harmon, la "patrino" de la videa kurso "Esperanto: pasporto al la tuta mondo", prezentis tiun novan 15-lecionan kurson, de kiu la unuaj kvar lecionoj jam estas aĉeteblaj. La nederlanda kantgrupo Akordo koncertis dufoje dum la tago. Oni povis ankaŭ spekti la nederlandan televidan filmon "La postlasaĵo de d-ro Zamenhof".

Inter la programeroj la gastoj estis regalitaj per viena kafo, kiun donacis Radio Aŭstria Internacia. Ili havis okazon konatiĝi ankaŭ kun William Harmon - kiu, same kiel Claude Piron, ĉi-jare fariĝis honora membro de UEA - kaj Michela Lipari, la ĝenerala sekretario de UEA.

Lennart Persson

**SOLVO DE 98/4**

|    | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1  | S | K | O | T | O | N | A | M |   |   |
| 2  | P | A | R | O | L | A | N | T | O | J |
| 3  | A | T | E | N | D | I | E | O | N | E |
| 4  | R | A | D | E | V | E | N | O | S |   |
| 5  | A | K | T | O | A | M | A | T | O |   |
| 6  | D | O | R | N | A | J | L | O | S |   |
| 7  | E | M | A | T | P | A | N |   |   |   |
| 8  | B | I | D | E | O | J | A | M |   |   |
| 9  | K | O | R | I | N | K | L | I | N | O |
| 10 | E | N | U | A | D | A | S |   |   |   |